



La
mondo
★ ne
havas
atendejon

de maurits dekker

SAT-Broŝurservo
Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut

MAURITS DEKKER

**LA MONDO
NE HAVAS ATENDEJON**

Teatraĵo en tri aktoj

El nederlanda lingvo tradukis

F. FAULHABER

**SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
67 AVENUE GAMBETTA. PARIS XII**

*Eldono financita kaj prizorgita de
ASOCIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ
en la regiono de la nederlanda lingvo F.L.E.
okaze de ĝia 40-jara jubileo en 1951.*

Fote represita de SAT-Broŝurservo, 1985.

*Klarigon de neologismoj kaj tradukon de fremd-
lingvaj vortoj oni trovos sur la lasta paĝo.*

*Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Adreso de la aŭtoro:
Alexanderkade 6, Amsterdam-O., Nederlando*



ĈE NIA JUBILEA ELDONO.

Se oni iam eldonos verkon pli malpli konforman kun la celado al nia porpacca idealo, ĝi certe neniam atingos la nivelon kaj aktualecon de ĉi tiu verko, prizorgita de F.L.E. okaze de ties 40-jara jubileo.

La aŭtoro plene sukcesis averti la homaron pri la konsekvencoj, antaŭ kiuj ĝi staras.

Hodiaŭ — la 30an de novembro 1950, kiam oni konsideras la uzadon de la atombombo — mi amare pripensas, ke verko kia tiu ĉi estas tiom aktuala.

Kiom ĝojiga estus la mondo, se la ideoj esprimitaj en ĉi tiu libro povus resti en la plumo, sed kiom danka mi estas, ke ekzistas homoj kapablaj verve pentri la angoron troviĝantan en nia koro!

Necesas, ke ĉiu homo sur la tuta terglobo vidu aŭ legu la teatraĵon. Kaj al kiu ni povus turni nin pli ĝuste ol al la internacia esperantistaro? Ni ŝuldas multan dankon al Maurits Dekker pro lia permeso traduki ĝin en Esperanton kaj per tio meti ĝin antaŭ plej vastan publikon.

La esperon, ke ĉi tiu eldono plene kongruos al la jubilea karaktero de nia kongreso kaj ke ĝi trovos multajn legantojn en la tuta mondo, esprimas la prezidanto de F.L.E.,

A. F. VAN HAREN.

PERSONOJ:

Profesoro CHARLES THOMSON
Doktoro JAMES THOMSON, lia filo
Doktoro MARY HOLMS, ĥemiistino
Inĝeniero GEORGE BENNER
Generalo GREENWAY
Doktoro CLARK, kuracisto
ANNA, maljuna mastrumistino
MAKS, elektristo

UNUA AKTO

Loko de agado: la kontrolĉambro de la laboratorio de fabriko por atombomboj: ĝi estas moderne kaj teĥnike aranĝita; ĉio helkolora kaj hele lumigita. En la malantaŭa muro du pordoj, unu dekstre, alia maldekstre. La pordo maldekstre estas normala, la pordo dekstre, kiu donas eniron en danĝeregan sektion de la fabriko, estas kirasita. Ankaŭ en angulo de la dekstra muro troviĝas pordo. En la maldekstra muro estas granda fenestro: antaŭ tiu fenestro staras labortablo, sur kiu kelkaj vitraj kaj metalaj instrumentoj, kaj krome kesteto. Sur la malantaŭa muro, maldekstre de la kirasita pordo, troviĝas brilmetala komutila tabulo kun mezuriloj, komutiloj kaj ruĝa kaj verda lampoj. Kiam la kurteno leviĝas, la verda lampo lumas. Ĉe la dekstra muro, proksime de la pordo, staras tablo simila al tiu ĉe la maldekstra muro, sed malpli granda. En la mezo skribotablo, sur kiu staras telefono kaj kuŝas kelkaj paperoj. Ĉirkaŭ la skribotablo kelkaj metalaj seĝoj. Estas mateno. Generalo Greenway (en generala uniformo) kaj profesoro Thomson (en civila vesto) interparolas.

GREENWAY: Ni do disponas ankoraŭ precize kvar semajnojn. Mi kompreneble ne volas tro urĝi vin, sed mi tamen tre dezirus, ke en la plej proksima plena kunveno de la registara komisiono vi komuniku, ke ni fine atingis la deziratan rezultaton.

Prof-o THOMSON: Ĝis tiu ĉi momento mi ankoraŭ ne estas tute certa pri mia afero, Ekscelenco.

GREENWAY: Sed la eksperimentoj ja eĉ trifoje plene konfirmis viajn supozojn!

Prof-o THOMSON: Ne plene.

GREENWAY: Mi do iru al via singardemo unu paŝon renkonte, dirante, ke la rezultatoj preskaŭ entute estas kontentigaj.

Prof-o THOMSON: Restas elemento de necerteco. (*Ridet-ante*): Sed militisto ja pli facile akceptas riskon ol scienculo. Tion kaŭzas la karaktero de la afero. Sed tiom longe, kiam la stabileco de mia Piradiumo ne estas certa, tiom longe, kiam ĉi tiu maso kondukas tiom kaprice, ke ni atendas ĉiumomente la plej strangajn surprizojn. . . .

GREENWAY: Timo, kiun neniu ei ĉi tiuj eksperimentoj jam konfirmis.

Prof-o THOMSON: Nek refutis. (*Serĉas inter la paperoj*).

Sajnas, ke la transmutacia raporto ne estas tie ĉi. Mia filo scias; li prenis gravan parton en tiu ĉi esplorado.

GREENWAY: Sed nun ja proksimiĝas la tempo por aperigi la rezultaton de ĉi tiu esplorado, kiu jam formangĝis multajn milionojn. Mi tre dezirus, ke vi baldaŭ povu rekte diri al la ministro kaj krome al la anoj de la komisiono: „Sinjoroj, ni estas pretaj; la Piradiumo estas al via dispono: ĝi estas realaĵo, same kiel la suno”. Ke mi, kiel prezidanto de la komisiono, povu diri: „Sinjoroj, per ĉi tiu prezida sonorilo mi anoncas novan atom-epokon. La malnovaj kaj malsimplaj fabrikadometodoj ne plu taŭgas: jen la nova materio, la Piradiumo de profesoro Thomson, miloble pli forta ol ĉio, kion ni faris ĝis nun, kaj facile fabrikebla, laŭ procedo, kiu estas sekreta kaj kiu estas nia plena posedaĵo. Sinjoroj, de ĉi tiu momento estas ni, kiuj povas ordoni!

Prof-o THOMSON: Jes, jes, sed povus!

GREENWAY: Sed tio, kion mi diras, ja estas konforma al viaj atendoj kaj al la faktoj!

Prof-o THOMSON: Kun rezervo pri la faktoro de necerto koncerne la stabilecon.

GREENWAY: Nu nu, Thomson! Ĉu la militisto ne povus nur unu fojon flankeniĝi de la preskribitaj reguloj kaj, anstataŭ silente obei, permesi al si rimarkon?

Prof-o THOMSON: Ĉu ĉi tie, en niaj ŝtataj atomfabrikoj, la militisto ne ĉiam havas la unuan kaj la lastan vortojn?

GREENWAY: Nur la plej lastan vorton, la decidan. Ĉion, kio ĝin antaŭas, ni lasas al la scienco. Sed nur unu fojon mi volas malobei tiun ĉi regulon, prenante la parolon antaŭ mia vico: Vian singardemon mi konsideras tro granda kaj pro tio danĝera.

Prof-o THOMSON: Danĝera?

GREENWAY: Iusence jes: por la estonteco de nia lando. (*Paŝante al la kirasita pordo*): Kara profesoro Thomson! (*Kun mangesto al la pordo*): Malantaŭ ĉi tiu pordo, en la kelo, sekure kaŝita malantaŭ muroj el granito kaj plumbo, muroj kvar metrojn dikaj, troviĝas dum proksimume ses semajnoj kvanto da via Piradiumo. Ĉi tiu maso estas — ni diru — ne multe pli granda ol la ŝarĝaĵo de mara mino. Malgraŭ tio ĝia eksploda forto estas pli granda ol la kunigita potenco de ĉiuj atombomboj, kiujn ni ĝis nun fabrikis tie ĉi. Se okazos en tiu maso ĉena reakcio, la tuta vivo en distanco de cent kilometroj...

Prof-o THOMSON: Cent mejloj.

GREENWAY: Pardonu al mi ĉi tiun eraron, ĉi tiun subtakson same malprofitan por via Piradiumo, kiel por mia rezonado... Sed afere: neniu scias pli bone ol vi, pri kio temas tie ĉi kaj kian katastrofon la potenco, kiu staras en la kelo, povas kaŭzi. Tamen, vi, ekstreme singarda homo, aŭdacis koncentrigi kvanton da tiu energio, sufiĉan por plene detrui en frakcio de sekundo kelkajn provincojn de nia lando. Ke vi aŭdacis fari tion, pruvas, ke vi estas konsiderinde certa pri via afero. Krom tio, vi havis tiun mason dum ses semajnoj sub via ekzakta kontrolo. Vi do plene konas ĝiajn ecojn kaj karakterizaĵojn.

Prof-o THOMSON: Almenaŭ sufiĉe por povi regi ĝin ĉi tie en la laboratorio. Sed antaŭ ol mi ĝin transdonos por la fabrikado de atombomboj...

GREENWAY: Sed pri tio ja ankoraŭ ne estas parolo! Nia lando ne estas en stato de milito; la cirkonstancoj do ne devigas nin peli la aferon ĝis ekstremo. Vi havas sufiĉe

da tempo por labori plue. Mi deziras nur, ke nia komisiono posedu vian raporton antaŭ ol la nova defendobudĝeto en la parlamento. . . .

Prof-o THOMSON: Sed la danĝero, kiun mi viadire kaŭzus al nia lando pro mia manko je rapidemo? Mi ankoraŭ ne komprenas. . . .

GREENWAY: Ni estas nur mortemaj homoj, profesoro Thomson! Povus okazi al vi — la ĉielo vin gardu! — akcidento. La sekreto de la fabrikado. . . .

Prof-o THOMSON: Konas ankaŭ mia filo.

GEORGE (*en blanka laboratoria surtuto, eniras tra la dekstra pordo kaj eklaboras ĉe la maldekstra tablo*).

GREENWAY: Malgraŭ tio mi preferas vidi ĉion fiksita en fina raporto, por ke aliaj, eventuale sen helpo de iu el ni, povu fari la Piradiumon. Ĉi tiu fabriko estas danĝera loko, kie ĉiuminute io povas. . . . Nu, mi konsideros mian respondecon kontentigita nur tiam, kiam kopio de la raporto estos sekure kaŝita en la trezorejo de la Departemento de defendado. Ni neniam forgesu, profesoro, ke la rezultatoj de nia laboro ĉi tie estas posedaĵo de la ŝtato.

Prof-o THOMSON (*iom ironie*): Ĉu vere?

GREENWAY: Ne indignu, mia kara Thomson: mia malpacienco igas min eble iom tro fervora, ĉio en la intereso de nia lando, kiu cetere ŝuldas al vi pli da danko ol al ĉiu ajn alia. Oni ne forgesos tion, jen, kion mi volas garantii al vi. Mian promeson vi do havas, kaj nun mi atendas la vian.

Prof-o THOMSON: Ke vi ricevos la finraporton post kvar semajnoj?

GREENWAY: La plenan ellaboritan raporton.

Prof-o THOMSON: Mi faros ĉion eblan. Cetere ni ellaboris la emanado-grafikojn pri la maso B jam tiom. . . . (*Li serĉas sur la skribotablo*). Mi nun tre dezirus montri al vi. . . . (*Al George*): Benner, kie estas mia filo?

GEORGE: Via filo havis noktan deĵoron kaj nun vizitas

por momento la kantonon por trinki tason da kafo. Li promesis tuj reveni. Cetere mi ankoraŭ ne transprenis lian kontrolan raporton.

MARY (*en blanka laboratoria surtuto, venas tra la maldekstra pordo kaj iras al la tablo kun aparatoj*).

Prof-o THOMSON: Mi serĉas la... (*mire*): Kio estas tio? Poemoj? Kiu legas en la laboratorio, kaj eĉ en la kontrolĉambro, poemojn?

MARY: Tiu libreto apartenas al via filo, sed mi ne kredas, ke li legas en ĝi.

Prof-o THOMSON: Miriga legaĵo!

GREENWAY: Eble por sin distri?

Prof-o THOMSON: La raportoj pri la B-maso devas kuŝi tie ĉi!

MARY: Mi supozas, ke James kunprenis ilin kaj ke ili nun kuŝas sur la skribotablo en via ĉambro.

Prof-o THOMSON: Dankon. — Benner, petu, ke oni voku mian filon. Diru al li, ke li ankoraŭ ne foriru, kaj ke mi devas paroli kun li. (*Al Greenway*): Mi povas tuj alporti al vi ĉiujn dokumentojn.

GREENWAY: Ne necesas; mi iros kun vi. (*Ambaŭ foriras maldekstre*).

GEORGE (*iras al la telefono, turnas numeron kaj parolas*): Ĉi tie la kontrolĉambro de la transmucia sekcio. Bonvolu diskonigi, ke doktoro James Thomson senprokraste venu tien ĉi, kie oni atendas lin... Jes, dankon. (*Al Mary*): Estas malagrabla, ke James neniam metas la aferojn sur ilian lokon. Li ja scias, kiel skrupula estas lia patro pri tiu ĉi punkto. Ke tio malkovriĝis ĝuste nun, en ĉeesto de tiu batalulo! Kaj ĝenas min ankaŭ la kontrolo-raporto de la pasinta nokto: mi eĉ ankoraŭ ne subskribis ĝin transprenita, kaj James jam foriris!

MARY: Feliĉe Thomson ĝin ankoraŭ ne vidis.

GEORGE: Espereble. Sed la poemoj! Kiel James do venis al legado de poemoj?

MARY: Ĉu vi neniam legas, kiam vi deĵoras nokte?

GEORGE: Almenaŭ ne poemojn.

MARY: Eble prozon?

GEORGE: Ion similan: fakan literaturon. Mi ne interesiĝas pri poemoj. Iu, kia James ne legu ĉi tie; tio tro multe distras lin. (*Rigardante en la nokta raporto*): Cielo, Mary, kia stultaĵo! Se la profesoro tion vidus!

MARY: Kio estas?

GEORGE: Jen, la nokta raporto de James; kaj li ĝin transdonis al mi tia!

MARY: Sed diru do, kio estas!

GEORGE: La kontrol-aparato de la pilo evidente stagnis kelkfoje ĉi tiun nokton.

MARY: Sed ja nenio misokazis?

GEORGE: Imagu, ke al ĉi tiu maso io misokazis!... Aŭskultu: trian horon dek kvar: perturbo en la temperatur-komutilo — kaj nun? Mi rigardu, kontrolu. (*Li iras al la komutila tabulo kaj legas la mezurilojn*): Hm, temperaturo normala... (*Li faras kelkajn komutojn*). Reakcio en ordo...

MARY: Tio do estas trankviliga. La perturbo verŝajne ne estis grava.

GEORGE: Nenio, kio rilatas ĉi tiun mason, estas tiom malgrava, ke ni rajtas malatenti ĝin. Nun certe ne...! Ne, Mary, pri tio vi nepre ne ridu... Ĉena reakcio en tiu ĉi maso... Mi ne kuraĝas eĉ nur pensi pri tio... La fabrikoj, la urbo, pli ol sesdek mil homoj, la tuta provinco...

MARY: Mi ridas ne pro tio, ke mi subtaksas la gravecon de la afero, sed pro via subita timo. Ĉu la produktoj, kiujn ni antaŭe havis en la pilo, estis pli sekuraj?

GEORGE: Relative jes, almenaŭ malpli malsekuraj ol ĉi tiu.

MARY: Ne por ni, kiuj laboras tie ĉi.

GEORGE: Eble ankaŭ por ni. (*Li denove komutas sur la tabulo*): La reguliga aparato funkcias.

MARY: Nu, jen vi vidas!

GEORGE: Pri tio mi tamen devis informi Thomson. Tion mi certe estus farinta, se mi antaŭe estus leginta la raporton, kiel postulas la regularo.

MARY: Vi ja ankoraŭ ne subskribis ĝin bonorda?

GEORGE: Tiom pli grave. (*Rigardas en la raporto*). Jen: la trian horon kvardek: devio de la mezuriloj inter si; malleviĝo de la temperaturo ĉe kreskanta emanado.

MARY (*rigardante kune en la raporto*): Tio estas nenio eksterordinara. Tiajn fenomenojn ni plurfoje konstatis ĉe la Piradiumo.

GEORGE: Tiom pli da singardo estas necesa... Jen, denove; legu: la trian horon kvindek kvar: la reguliga aparato rifuzas dum kreskanta temperaturo.

MARY: Tio pruvas, ke James tamen havis tempon por ekrigardi for de siaj poemoj. Kaj kiel! Kvaran horon du: la reguliga aparato denove funkcias normale, la temperaturo reboniĝis. Poste ĉio estas en ordo: je la kvara tridek, je la kvina, ja la kvina tridek: temperaturo normala.

GEORGE: Vi tro facilanime pensas pri tio, Manjo! Ni, sole ni portas respondecon pri ĉio... pri ĉiuj vivoj, pri nia propra vivo ni eĉ ne parolu... (*Li iras denove al la komutila tabulo kaj kontrolas*).

MARY: (*ĉe la kesteto, kiu staras sur la labortablo*): Mi neniam imagis, ke mi eskapos, kiam ĉi tie io misokazos.

GEORGE: Tion mi povas kompreni. Nun eĉ tute ne. Niaj plej profundaj kaŝejoj senvaloriĝis pro la energi-eksplodoj, pri kiuj nun temas. Sed feliĉe, la afero denove estas perfekte en ordo.

MARY: (*rigardante en la kesteton*): Venu do, kara besteto, ne timu! Kiel ĉarmaj, inteligentaj okuletoj! Turnu al mi vian kapeton!

GEORGE: Ĉu vi denove havas marmoton?

MARY: Palpu ĝian haŭton: kvazaŭ veluro.

GEORGE: Kvazaŭ veluro, jes. (*Li ridas*).

MARY: Ĉu ne vere? Kaj ĝian koreton! Kiom rapide ĝi batas! Eble pro timo.

GEORGE: Nu, nu! Tiaj malgrandaj bestoj havas multe pli rapidan korbataĵon ol homoj. Ankaŭ infanoj. Kaj pro kio ĝi timus? Ja ne pro vi?

MARY: Eble.

GEORGE: Se vi tiel karesus miajn imentonon kaj kapeton, ankaŭ mia koreto batus multe pli rapide.

MARY: Kaj se vi krom tio sidus en tia kesteto, atendante radiumadon per mortigaj G a m m a-radioj. . . . ! Kaj se vi ankaŭ komprenus, ke estas via ekzekutisto, kiu karesas vin. . . . !

GEORGE: Ĉu ne ankaŭ amantaj homoj estas reciproke siaj ekzekutantoj? Sed, diru al mi: ĉi tiu marmoto ja ne estas la hieraŭa besto?

MARY: Jes, la sama.

GEORGE: Kaj la radiumado? Dum du sekundoj, diris la profesoro.

MARY: Ĝi ne estas radiumita. Cetere estas James, kiu ricevis tiun komision, ne mi.

GEORGE: Certe fulmotondros, kiam doktoro Clark demandas la profesoron pri sia marmoto.

MARY: James diras, ke ne kiel buĉisto li servas ĉe la sinjoroj de la medicina sekcio. Kaj ĉu vi trovas la radiumadon de tiuj bestoj amuza? James pravas: unu eksperimento post la alia, per hundoj, katoj, porkoj, kunikloj. De tempo al tempo ŝajnas tie ĉi buĉejo.

GEORGE: Sincerdire, mi neniam rimarkis, ke ĉi rilate ekzistas granda diferenco inter fabriko de atombomboj kaj buĉejo. Kompare kun tio, kion ni ebligas al la militistoj, la laboro en buĉejo estas nur infanludo. Ĉi tie ni nur ne vidas la rezultatojn kaj ni fermas niajn okulojn antaŭ la realo.

MARY: Oĥ, se oni faras nur sciencan laboron. . . .

Prof-o THOMSON (*venante de maldekstre*): Ĉu mia filo

ankoraŭ ne venis?

GEORGE: Mi igis voki lin. Profesoro, mi havas en la manoj la noktan raporton. Mi ankoraŭ ne transprenis ĝin, sed el la notoj de James mi vidas....

Prof-o THOMSON: Ion gravan?

GEORGE: La reguliga aparato de la pilo ĉi nokte interrompis sian funkciadon.

Prof-o THOMSON: De la pilo? Interrompis sian funkcion? (*Li rigardas en la raporton*). Kaj eĉ kelkfoje! Kaj kio okazis poste? Kiajn arangojn faris mia filo? (*Li refoje rigardas en la raporton*). Neniajn?.... Kaj vi, kion vi faris?

GEORGE: Mi esploris la komutilojn. Ĉio nun estas en ordo.

Prof-o THOMSON: Kiel vi konstatis tion? Kiom da certeco vi havas, ke la malfunkciado ne ripetigis? Ĉu muntisto esploris la aferon?

GEORGE: Ankoraŭ ne.

Prof-o THOMSON: Ankoraŭ ne? Sinjoro Benner, tio estas netolerebla! Tio estas skandala malatento de vi kaj.... kaj de mia filo! (*Li iras al la telefono kaj turnas numeron*): Ĉi tie la kontrolĉambro. Kun profesoro Thomson. Sendu senprokraste Maks ĉi tien por kontroli la reguligan aparaton de la pilo! (*Li remetas la mikrofonon, rigardas la mezurilojn, poste denove prenas la raporton kaj iras al la tablo, sur kiu staras la kesteto kun la marmoto*): Ĉu okazas plurfoje, ke la deĵoroj estas transprenataj sen kontrolo?

GEORGE: Neniam, profesoro! Ankaŭ nun tio ne okazis; ĝi estis nur por momento prokrastita ĝis James estos reveninta.

Prof-o THOMSON (*rigardante sian horloĝon*): Por momento? (*Vidante la marmoton*): Tiun marmoton, Mary, ni ne bezonis ricevi returne; ĝi estas provbesto de doktoro Clark.

MARY: Mi scias nenion pri tio, profesoro.

Prof-o THOMSON: Sed vi ja ĉeestis hieraŭ, kiam mi diris

al mia filo, ke tiu besto estu radiumata dum du sekundoj?
Kiam tio okazis?

MARY: Tio ankoraŭ ne okazis, mi kredas.

Prof-o THOMSON: Ne okazis? Komisio, kiu dudek kvar horojn poste ankoraŭ ne...?

MARY: Nenion plian mi scias pri tio.

Prof-o THOMSON: Sed mi diris al James... (*Oni frapas*).
Eniru!

MUNTISTO (*venas de dekstre*).

Prof-o THOMSON: Maks, la reguliga aparato ne estas en ordo. Kiam oni lastfoje kontrolis la aparataron?

MAKS: Mi mem ĝin kontrolis unu semajnon antaŭ la muntado de la nova pilo.

Prof-o THOMSON: Kaj?

MAKS: Ĉio estis en bonega ordo. Mi ankaŭ lubrikis la motoron de la kadmiaj platoj.

Prof-o THOMSON: Kaj ĉu poste vi ne plu estis malsupre?

MAKS: Malsupre? Eĉ por nenia trezoro en la mondo, profesoro! Mi estas patro de tri infanoj!

Prof-o THOMSON: Mi volis diri: *antaŭ* la funkciigo.

MAKS: Tute ne. Mi ne tre ŝatas tiun kelon.

Prof-o THOMSON: Kiel ajn la afero statis, *nun* io ne estas en ordo. Laŭ la nokta raporto la reguliga aparato kelkfoje interrompis sian funkciadon, lastfoje hodiaŭ matene je la tria kvindek kvar. Kontrolu ĉion do eksterordinare bone!

MAKS (*esplorante la komutilaron per provlampo*): Mi ne komprenas, kio povus lami. Ĉio estas en ordo: sekurigiloj, aŭtomato, kontaktoj. Bonvolu mem rigardi.

Prof-o THOMSON: Mi vidas, sed tamen devas esti ie...

MAKS: Mi ne komprenas, kiel estas eble, ke io ne regule funkcias. Eĉ se la elektra kurento de la urba centrejo ĉesas, ĝi komutiĝas aŭtomate kun la baterioj.

Prof-o THOMSON: Sed la interrompoj?

MAKS: Ne okazis en la elektra parto. (*Li serĉas plue*).

JAMES (*en blanka laborsurtuto, aperas el la dekstra por-do*): Bonan matenon, Patro. Ĉu vi igis voki min?

Prof-o THOMSON: Jam antaŭ preskaŭ duona horo!

JAMES: Mi vizitis por momento. . . . (*Vidante la muntiston*): Ĉu denove io ne estas en ordo?

Prof-o THOMSON: Tio estas la kontrolo, kiu devus esti okazinta la pasintan nokton, tuj post kiam vi rimarkis, ke io lamas. (*Al la muntisto*): Ĉu vi sukcesis trovi la kaŭzon?

MAKS: Ne, profesoro.

JAMES: Kaŭzis tion verŝajne la temperatur-komutilo.

MAKS: Absolute ne! Tiu objekto estas tiom obeema kiom hundeto. Bonvolu rigardi. (*Li turnas la komutilon*).

JAMES: Kio do kaŭzis la perturbon?

MAKS: Nu, homo povas esti jen sana, jen tuj mortinta. Miaj kondukiloj estas en ordo. Kaj la cetero, nu, la cetero ne apartenas al mia laboro. (*Montrante la kirasitan por-don*). Jen sekcio via. G a m m a-radioj! Eĉ ne por miliono mi irus malsupren.

Prof-o THOMSON: Tiam donu vian laborslipon. (*Al George*): Benner, bonvolu subskribi.

GEORGE (*subskribas la laborslipon de la muntisto kaj ĝin redonas*): Mi petas.

MAKS: Dankon. (*Li malaperas dekstre*).

JAMES: Ĉu vi ankoraŭ bezonas min, Patro?

Prof-o THOMSON: Bedaŭrinde, jes. Se vi estus preta pri via laboro, mi lasus vin iri, sed nun mi devas serĉi la raportojn. . . .

JAMES: Mi metis ilin sur vian skribotablon.

Prof-o THOMSON: Kun nur parto de la grafikaĵoj kaj sen la B-raporto!

JAMES (*montrante al la skribotablo*): Ĉi tie devas esti ankoraŭ. . . .

Prof-o THOMSON: Tie mi trovis nur poemaron kaj ne-transdonitan raporton. . . . Sed pri tio ni parolos poste.

Nur pri tiu. . . . pri tiu marmoto. . . . Kiel statas mia komi-
sio pri la radiumado de tiu besto?

JAMES: Ĉu ankaŭ ĝi devas. . . .? Ĉu la uloj de la medicina
sekcio pensas, ke ni. . . .

Prof-o THOMSON: Mi demandis, ĉu tiu marmoto estas ra-
diumita!

JAMES: Ne!

Prof-o THOMSON: Fulmotondro! (*Li ekregas sin. — Al
Mary*): Doktoro Holms, bonvolu tuj doni al la besto
dusekundan radiumadon sen filtrilo; pliajn indikojn vi
povas legi sur la slipo.

MARY: Jes, profesoro.

Prof-o THOMSON: Kaj bonvolu alportigi ĝin al doktoro
Clark kun mia senkulpigo pri la prokkrasto.

MARY: Mi faros, profesoro.

GEORGE (*ĵetas flugan rigardon al la du aliaj, kaj vidante,
ke minacas malagrablaĵoj kaj ke estas pli prudente foriri,
li sekvas Mary kaj malaperas*).

Prof-o THOMSON (*prenante la poemaron de la skribtablo*):
Greenway vizitis min kaj petis la definitivan raporton
pri la Piradiumo.

JAMES: Jam nun?

Prof-o THOMSON: Ni disponas ankoraŭ kvar semajnojn.
Mi rigardis, kiom progresis via laboro, ĉar vi bonege
povus utiligi la silenton dum via nokta deĵoro, kompa-
rante la mezur- kaj kalkulrezultatojn. Anstataŭ listojn
kaj konkludojn, mi trovis netransdonitan noktraporton
kaj tion ĉi. . . . poemaron verkitan de iu sinjoro Young. . . .
Tre interesan.

JAMES: Oĥ, Patro, tiu poemaro. . . .

Prof-o THOMSON: Momenton! Mi ankoraŭ ne finis. Vi for-
gegis averti la teĥnikan servon, kiam okazis perturbo, di-
fekto, kiu povus havi fatalajn sekvojn, ĉar vi estis tro
okupita pri legado de ĉi tiu saĝo. (*Li foliumas la libre-
ton*). Jen legu! Kion diras tiu sinjoro? (*Li legas*): „La

timo antaŭ la morto ne estas tiom malestiminda kiom la timo antaŭ la vivo." Bele dirite: senkulpigo por malkuraĝuloj!

JAMES: Ne tion Young volis diri, Patro!

Prof-o THOMSON: Kion tiu viro volis diri, ne interesas min, James. Min interesas nur la irado de la aferoj en mia laboratorio, kaj mi postulas de ĉiu, kiu laboras ĉi tie la saman akuratecon, la saman sindonemon kaj la saman diligentecon, kiujn mi mem praktikas. Legado de poemoj ne konvenas al mia laborprogramo!

JAMES: Patro, mi laboras tie ĉi pli ol tri jarojn kaj do ne bezonas diri al vi, ke en tiu tempo mi okupis min ankaŭ per io alia ol la legado de poemoj.

Prof-o THOMSON: Jam la nura fakto, ke vi opinias, ke vi devas diri tion al mi, pravas, ke io en vi ne estas en ordo. Cetere ekzistas pli multe, James, kio ne plaĉas al mi, ho ve! Mi ne volonte uzas mian prestiĝon; mi malŝatas disdoni riproĉojn, sed mi ne povas toleri, ke la irado de la aferoj en mia laboratorio estas influata de aliaj, aŭ ke iu ignoras miajn komisionojn. Mi ne toleras tion de kiu ajn, nek de mia filo.

JAMES: De mi? Vi diras, ke iun komision vian mi...?

Prof-o THOMSON: Hieraŭ mi komisiis al vi, radiumi tiun marmoton. Tio ne okazis. Kial ne?... Nu, James?

JAMES (*silentas*).

Prof-o THOMSON: Kial vi ne respondas?

JAMES: Tial, ke mi ne volas serĉi pretekstojn, Patro, kaj pro tio, ke, dirante la veron, mi riskus fari min ridinda en viaj okuloj.

Prof-o THOMSON: Mi ĉiam klopodas kompreni, antaŭ ol ridi.

JAMES: Se mi diros la kialon, vi eble ekkoleros. Sed tion mi ne timas.

Prof-o THOMSON: Kio do retenas vin?

JAMES: La timo, ke vi min tamen ne komprenos. Patro,

tiun marmoton mi indulgis pro kompato, pro pento, pro kulposento, eble pro timo....

Prof-o THOMSON (*mire*): Vi indulgis.... marmoton pro.... timo?

JAMES: Kompreneble vi nun trovas min malsaĝulo, sentimentala idioto.

Prof-o THOMSON: Mi ankoraŭ ne povis formi opinionon, ĉar viajn motivojn mi ne povas kompreni.

JAMES: Tion mi atendis.

Prof-o THOMSON: Sed vi ja ne volas aserti, ke vi kompatas stultan, senracian beston, ke vi volas indulgi marmoton pro...., jes, fakte pro kio?

JAMES: Pro vi kaj pro mi mem, pro la homoj, Patro.

Prof-o THOMSON: Pro kio alia ol pro la homoj tiuj bestoj estas radiumataj? Kio alia instigas la medicinistojn, kiuj faras tiujn ĉi eksperimentojn, ol la celo povi kuraci viktimojn de la G a m m a-radioj? James, ĉu via trosentemo ne inklinas al sentimentaleco?

JAMES: Mi sciiĝas, ke tiu vorto venos. Ĝi pruvas, ke vi ne komprenas min.

Prof-o THOMSON: Pri tio vi mem kulpas. Viajn ideojn ne povas kompreni sane pensanta homo, kiu staras ambaŭpiede sur la tero.

JAMES: Kaj se tiu homo, kiu imagas, ke li estas sana kaj senpasia, evidentiĝus morte *malsana*? Se venus iu, kiu diras: Vi, kiu opinias stari ambaŭpiede sur la tero en la realo, vi estas fantaziulo; vi, kiu imagas, ke vi povas helpi kaj kuraci la homojn, vi nur *malsanigas* ilin; vi semas timon, morton kaj pereon; vi konstruas senbride, sed nur por ke vi povu pli rapide pereigi!

Prof-o THOMSON: James, ĉu tio estas.... ĉu tio estas ri-proĉo, ĉu vi volas diri al mi, via patro....

JAMES: Al neniuj mi riproĉas ion; mi volas nur klarigi. Patro, mi devas malkaŝe paroli kun vi, ĉar tiel mi ne povas daŭrigi. Mia kontrakto finiĝos post tri monatoj; mi

volas tiam forlasi la fabrikon; mi volas foriri de tie ĉi.

Prof-o THOMSON (*emociite*): Ĉu vi . . . ĉu vi volas forlasi min? Ĉu vi volas foriri de ĉi tie, nun, kiam ni kune estas publikigontaj la rezultatojn de niaj esploroj; nun, kiam vi estas ligonta vian nomon al la malkovro de la Piradiumo, unu el la plej gravaj okazintaĵoj en . . .

JAMES: Mi ne kapblas daŭrigi. Mi ne volas porti pluan respondecon. Mi ne volas esti kunkulpa pri . . . murdado!

Prof-o THOMSON: James!

JAMES: Pri amasa murdado, pri amasa neniigo, eble pri la pereco de ĉi tiu civilizacio. Jes, Patro, mi indulgis ĉi tiun marmoton, mi savis *unu* stultan, senracian beston pro kulpokonscio, pro koncienciproĉo, tial ke mi scias ke mi estas kunresponda pri la preparo de murdado al milionoj.

Prof-o THOMSON: Sed mia kara James, vi kuregas senbride! Tiel ja ne parolas prudenta homo, eĉ se vi efektive havus certajn skrupulojn. Se tio, kion vi diras, estus vera, mi, la ĉefo de ĉi tiu laboratorio, estus la *a u c t o r i n t e l l e c t u a l i s* de tio, kion vi nomas amasmurdado.

JAMES: Ne vole, ne konscie, sed malgraŭ tio, vi . . .

Prof-o THOMSON: Mi plenumas mian laboron kiel scienca esploristo en servo de . . .

JAMES: En servo de kio, de kiu? Ĉu de la homaro?

Prof-o THOMSON: En ĉi tiu rilato . . . abstraktaĵo.

JAMES: Do en servo de la scienco?

Prof-o THOMSON: Ekzemple.

JAMES: Tio estas pli malbona ol abstraktaĵo, tio estas mensogo, eraro . . . Per nia laboro ni havigas al aliaj la armilon por murdado.

Prof-o THOMSON: La atomenergio donos al la homaro, tuj kiam en ĉi tiu rilato ni povos paroli pri tio, gravan utilon. Antaŭ tiu momento ni devas esti paciencaj, ni devas direkti nin al tio, kio estas ebla, kaj ne perdiĝi en senutilajn kaj eble eĉ danĝerajn dezirajn revojn. Mi dezirus, ke estu alie, sed por viaj idealoj la tempo ankoraŭ ne

venis, mia knabo

JAMES: Kontraŭe, Patro: jam estas urĝa tempo!

Prof-o THOMSON: Sed ni ja havas ankoraŭ sufiĉe da tempo por prokrasti ĉi tiun interparolon, ĝis kiam ni kune trankvile sidos iun vesperon hejme?

JAMES: Kaj mia peto pri aksiĝo?

MARY (*eniras de dekstre. Ŝi aŭdis la lastajn vortojn de James*).

Prof-o THOMSON: Ankaŭ pri tio ni daŭrigos hejme. (*Al Mary*): Nu, ĉu preta pri la marmoto?

MARY: Jes, profesoro.

Prof-o THOMSON: Bone. (*Al James*): Antaŭ ol vi foriros, faru al mi plezuron kontroli kune kun Mary la B-raportojn. Hodiaŭ posttagmeze mi bezonos ilin.

JAMES: Sed vi diris....

Prof-o THOMSON: Ke tiu laboro povas atendi la pretigon de la transmutaciaj grafikajoj. Sed mi jam diris al vi, ke generalo Greenway min vizitis. Li nepre deziras, ke antaŭ la proksima plena kunveno de la komisiono ni estu pretaj.

JAMES: Kaj se la militistoj ordonas, tiam....

Prof-o THOMSON: Tiam ni obeas pro devosento.

JAMES: Por kontentigi nian konsciencon.

Prof-o THOMSON: Kiel bona ŝtata civitano, kiu komprenas sian devon; kiel esploristo, kiu komprenas, ke povas prezentiĝi procesoj, kies iradon li neniel povas plirapidigi, nek eĉ nur influi. . . .Nu, Mary, James, ĉu vi faros?

MARY: Certe, profesoro.

Prof-o THOMSON: James?

JAMES: Jes, Patro.

Prof-o THOMSON: Mi nun devas foriri kun Atkins, sed mi atendas trovi ĉion sur mia skribotablo, kiam mi estos reveninta. (*La foriras maldekstre*).

MARY: Ĉu mi tuj prenu la listojn, James?

JAMES (*sen entuziasmo*): Oĥ, jes.

MARY: Vi ne havas multe da emo, ĉu?

JAMES: Mi tute ne havas emon. Sed ni komencu; mi ja promesis tion.

MARY: Mi legos la ciferojn laŭ la sinsekvo de la rubrikoj, por ke vi facile povu enskribi ilin.

JAMES: Bone. Bonvolu komenci.

MARY (*legas*): B-raporto, numero 114, strio 12.

JAMES (*ripetas kaj skribas*): B, 114, strio 12.

MARY (*legas*): Finaj ciferoj de la naŭa eksperimento....

JAMES(*ripetas kaj skribas*): Finaj ciferoj, naŭa eksperimento.

MARY: (*legas*): Naŭ, du, kvar, punkto, nulo, nulo, du, punkto, unu.

JAMES (*ripetas kaj skribas*): naŭ, du, kvar, punkto, nulo, nulo, du, punkto, unu.

MARY: Dua kolono, elektronoj: sep, punkto, kvin, nulo, nulo, punkto, ses, nulo, nulo.

JAMES (*ripetas kaj skribas*): Dua kolono, elektronoj: Sep, punkto, kvin, nulo, nulo, punkto, ses, nulo, nulo.

MARY: Relativa radiado.... Aŭskultu, James....

JAMES: Ĉu ankaŭ tiujn du lastajn vortojn mi devas transpreni?

MARY: Mi volas demandi vin pri io.

JAMES: Bonege; tio sonas pli agrable ol la voĉlegado de ciferoj.

MARY: Mi volas fari al vi malmodestan demandon.

JAMES: Vi, malmodestan demandon? Nu, faru!

MARY: Ĉu la ĵusa fulmotondro estis grava?

JAMES: Iom grava, almenaŭ de mia flanko. Ĉu tio estas via malmodesta demando?

MARY: Ĉu mi aŭdis bone, kion vi diris dum mia eniro?

JAMES: Pri mia ekŝigo?

MARY: Jes.

JAMES: Tion vi bone aŭdis. Ĉu vi trovus malagrabla, se mi forlasus la fabrikon?

MARY: Ne faru superflujajn demandojn. Ni cetere devus esperi pri taŭga anstataŭonto.

JAMES: Ĉu nur pro tio?

MARY: Ne nur, sed *ankaŭ* pro tio.

JAMES: Sincerdire, mi neniam ricevis la impreson, ke vi havas pri mi tre altan opinionon.

MARY: Oĥ....

JAMES: Ne necesas, ke vi senkulpigu vin. Ekzistas pluraj homoj, kiuj ne havas altan opinionon pri mi, ekzemple mi mem.

MARY: Estas vere vante, tiamaniere ĉasi komplimentojn. Vi nur ne atendu, ke mi laŭdos vin.

JAMES: Mi scias, ke tuta via laŭdo estas por mia patro. Estu tiel; li meritas tion pli multe ol mi, iurilate.

MARY: Vi ĉiam estis bona kolego.

JAMES: Bona kolego, sed iu, kiu pro manko de entuziasmo aŭ vera interesiĝo estis tro pasiva; iu, kiun oni nomas bona kamarado, kompatema frato, malsaĝa kiel ŝtipo, sed bonkora.

MARY: Tamen vanta.

JAMES: La privilegio de la malsaĝuloj.

GEORGE (*eniras maldekstre*).

MARY: Ĉu vi firme decidis, forlasi la fabrikon?

JAMES: Hodiaŭ vespere mi parolos plu kun mia patro kaj poste mi sendos mian peton pri ekziĝo.

GEORGE: Kion mi aŭdas, James? Ĉu vi efektive intencas forlasi ĉi tiun plej sanktan templon de la moderna scienco?

JAMES: Jam antaŭ longe mi decidis ne renovigi mian kontrakton.

GEORGE: Kaj poste, kien iri, ho laca pilgrimanto? Kie ĉi tiu juna talento troviĝos lokon, sur kiu ĝi ricevos agnoskon same grandan, kaj rekompencan same bonan? Kaj kiel iros plu la eltrovaĵo de via patro, la Piradiumo, al kiu vi ja kontribuis? Ĉu vi ne tro facile rezignas famon

kaj laŭrojn, karulo?

JAMES: Tiun famon mi volonte donacos al alia!

MARY: Kaj la laboro ĉi tie? Kie vi povus fari tiom multe da interesa esplora laboro?

JAMES: Scienca esplorado serve de amastombejoj kaj krematorioj!

MARY: Vere tipa kaj fantazia respondo, kiun oni povas atendi nur de vi....

JAMES: De seniluziiginta Samaritano!

GEORGE: La respondo de iu, kiu en sia koro havas tre bonajn intencojn koncerne la mondon. Nia homamiko eĉ ne tute malpravas.

MARY: Vi ja ne volas aserti, ke vi konsentas kun li?

GEORGE: Eĉ kun mi mem mi ne konsentas, tiom malpli kun aliaj. Sed mi komprenas liajn skrupulojn, kvankam en la bonaj rilatoj, kiujn ni subtenas kun la morto, mi ne vidas motivon por ekŝiĝi.

JAMES: Ĉu ne? Sed antaŭ ne longe vi pravigis min, kiam mi diris, ke mi ne simpatias la ideon, doni miajn sciojn kaj plej bonajn fortojn al la fabrikado de atombomboj.

GEORGE: Tion mi ne forgesis kaj mi pravigas vin ankoraŭ nun.

MARY: Kiu ĉi tie okupas sin pri atombomboj? Mi faras laboron, kiun mi opinias utila kaj kiu interesas min. Kion aliaj faras per ĝi, tio estas ilia afero!

GEORGE: Ankaŭ vi pravas; ni nur faras en pure scienca maniero la ŝnuron, per kiu aliaj estos pendigataj.

MARY: Kia troigo! Tiel mi ne sentas tion.

GEORGE: La ŝnuron sentos nur la homo, kiu devas meti en ĝin sian kapon. Via ĉarma kapeto provizore ne estos en danĝero.

MARY: Nun ĉesigu viajn malspritajn ŝercojn! Vi cetere ne rajtas moki. Kiu rezonas laŭ du manieroj kiel vi, demandu al si, ĉu io en li ne estas bonorda.

GEORGE: Io? En mi *nenio* estas bonorda! Mi eble estas

sur malpli ĝusta loko ol James. Displaced person number one!

JAMES: Ĉu tio estas unu el viaj spritaj elpaŝoj aŭ ĉu vi parolas serioze....?

GEORGE: Tute serioze kaj plene konscia pri mia malpotenco.

JAMES: Kaj malgraŭ tio vi trankvile daŭrigas ĉi tie vian laboron!

GEORGE: „Trankvile” estas iom eŭfemisma esprimo pri iu, kiu loĝas sur vulkano.

JAMES: Sed evidente sufiĉe trankvile por ne deziri transloĝiĝi.

GEORGE: Transloĝiĝi? Kien? Ĉu eble al alia vulkano? Ni estas kaptitaj en ĉi tiu mondo kaj devas partopreni, vole aŭ nevole. Oni ne povas eviti tion, same kiel oni ne povas eviti sian ombron. La afero ruliĝas kaj oni ne povas haltigi ĝin, same kiel oni ne povas haltigi naturkatastrofon aŭ la leviĝon kaj la malleviĝon de la suno.

JAMES: Oni povas retiriĝi el ĝi, rifuzi esti kunkulpa.

GEORGE: Ĉu vi supozas tion?

JAMES: Mi estas pri tio konvinkita.

GEORGE: Ekzistas tiaj idealistoj kun rokofirma konvinko. Matene, kiam tagiĝas, ili metas sian kapon sub la litkovrilojn, dirante, ke la suno ne leviĝis. Ankaŭ tio estas maniero por ŝanĝi la aferojn!

JAMES: Ŝanĝiĝas nenio kaj la putrado daŭras, ĉar la plimulto el la homoj, kvankam sciante la veron, tamen pensas kaj agas same kiel vi.

GEORGE: Sed ili efektive *ne* scias la veron! Se la veron ili sciis, tiam almenaŭ ekzistus ankoraŭ espero. Sed preskaŭ ĉiu partoprenas ne pensante, ĉar la vivo, ankaŭ en ilia duondorma stato, estas por la plimulto jam sufiĉe malfacila.

JAMES: Kaj al tiu plimulto vi aliĝis libervole, vi, kiu nepre scias la veron?

GEORGE: Tio estas aranĝo por sekureco kaj afero de sperto. Mia tuta familio estas murdita de tiuj dormantoj, kaj mi estas la sola, kiu restis el sep-persona familio. Mi havis, kiel oni nomas tion, okazon kolekti iom da sperto pri homoj; ĝi estis naŭza, sanga kurso. . . . Oni ne povas malhelpi la faladon de hajleroj, kiujn la atmosfero ellasis, kaj homojn kaptitajn de la irado de l' okazantaĵoj oni ne povas haltigi. Tiuj. . . e. . . samsortanoj niaj, kiuj pereigis miajn gepatrojn kaj gefratojn, ne estis denaskaj krimuloj; ili nur hazarde fariĝis murdistoj, ĉasistoj, buĉistoj, nur hazarde ili estis sensciaj, stultaj somnambuloj, hajleroj falintaj teren.

JAMES: Kulpuloj!

GEORGE: Kulpuloj ili fariĝis nur poste, kiam ili malvenkis, kiam la irado de la okazantaĵoj prenis alian direkton. Se ili estus venkintaj, ili estus herooj aŭ superhomoj aŭ mondreformistoj. . . . Ne, James, tiu, kiu sidas en la karuselo, devas kurnurniĝi, ankaŭ kiam li sentas kapturniĝon aŭ malsaniĝas. Oni ne povas eskapi el tio. Ĉi tiu mondo ja ne havas atendejon por tiuj, al kiuj la ludo ne plaĉas kaj kiuj volas resti ekster ĝi.

JAMES: Tio estas tre bone dirita, ĝi sonas preskaŭ poezie, sed ĉu ĝi estas vera?

GEORGE: Nu, ĉu ĝi *ne* estas vera? Jam la nura fakto, ke ni ekzistas kaj bezonas aliajn, devigas nin daŭrigi nian partoprenon en ĉi tiu ludo, eĉ se ni iufoje vomus pro naŭzo. Ne fari atombombojn? Bone, sed kion do? La tuta socio estas unu giganta fadenbulo, en kiu ĉiu implikiĝas. La kudristino, kiu faras naciajn flagojn, kaj la kamparano, kiu sterkas sian teron, faras esence la samon kiel ni per niaj provtubetoj kaj elektron-kalkuliloj. Unu afero, unu nedisrompebla tuto!

JAMES: Ĉiu povas klopodi elŝiri sin el ĉi tiu nedisrompebla tuto, se li nur ne timas, ke liaj vestoj ŝiriĝos. Estas pli bone, ricevi kelkajn ŝirojn ol servi malaprobindan aferon.

GEORGE: Sed kiu certigas vin, ke ĝi estas malaprobinda?

Ĝi simple estas tia, kia ĝi estas. Ĉu vi povas elekti? Mi ne!

JAMES: Mi jam estas elektinta. Por mi, dank' al Dio, atendejo ekzistas.

GEORGE: Mi timas ne nur, ke vi devos longe atendi, sed ankaŭ, ke por atendi vi eĉ ne ricevos okazon. Ni vivas en tempo de bunkeroj kaj kaŝejoj, kaj ekzistas neniu popolo, kiu konstruas atendejojn, neniu nacio, kiu toleras rigardantojn kiel vin.

(La telefono tintas).

JAMES: Ĉi tio estas la kerno de la afero, la punkto, pri kiu temas; ĉi tio estas afero, kiu grave superas ĉiujn naciajn interesojn. La atomenergio devas esti, same kiel la sunlumo kaj la atmosfero, posedaĵo de la tuta homaro.

(La telefono tintas).

GEORGE: Certe, ĉi tio estas la kerno de la problemo: atomenergio por la tuta homaro: demando pri distribuado. *(Li parolas en la telefono):* Jes, kontrolĉambro.... Jes, kun tiu vi parolas.... Ne, la tensio nepre ne malaltigu ĝis sub miliono da voltoj.... Kion vi diras?.... Ne, nepre ne! *(Li remetis la mikrofonon).* Tio estis Harris. Li evidente estas denove en embaraso.... Momenton. Mi tuj revenos. *(Li foriras maldekstre).*

JAMES: Kaj vi, Mary? Vi silentis. Vi nenion plu diris.

MARY: Mi aŭskultis la parolojn de George. Mi kredas, ke li estas prava.

JAMES: Ĉu vere? Oĥ, jes....

MARY: Mi opinias, James.... Ĉu mi povas paroli malkaŝe?

JAMES: Ne timu!

MARY: Mi sentas unuflanke ion malkuraĝan en via retiriĝo el la ĉi tiea laboro. Via ago cetere ne alproksimigas eĉ nur per unu paŝo la ĝeneralan solvon.

JAMES: Tio ne klarigas al mi la malkuraĝecon de mia decido. Sed vi eble pravas: mi ja ne estas heroo.

MARY: Vi povus iom atendi, antaŭ ol esprimi vian ironion.

ĉar mi ankoraŭ ne finis... Ni ĉiam agrable kunlaboris, James.

JAMES: Kelkfoje jes; de tempo al tempo evidentiĝas, ke la homoj povas tre agrable kunvivi. Bedaŭrinde, oni ĝenerale ne tre multe rimarkas pri tio, escepte en filmoj. Vi do trovas min ne multe pli bona ol... ol dizertulo.

MARY: Oĥ ne, tio estas sensencaĵo. Ĉar mi diris, ke vi volas lasi nin....

JAMES: Sed vi ja ne povas havi multe da estimo por iu....

MARY: Kontraŭe!

JAMES (*mire*): Kion mi aŭdas, Mary: vi pravigas George, vi trovas min malkuraĝa, kaj malgraŭ tio....?

MARY: Jes, malgraŭ tio! Mia intelekto vin malpravigas, kaj tamen, James, en mia koro....

JAMES: Daŭrigu....

MARY: Mi admiras vin.

JAMES: Serioze?

MARY: Granda ĉielo, jes! Iu, kiu malgraŭ ĉio aŭdacas elekti, kiu kapablas kolekti la kuraĝon por esti malkuraĝulo.... ŝajni malkuraĝulo....

JAMES: Nu, nu!

MARY: Romantika sensencaĵo, ĉu ne? Sed per la koro oni rajtas esti romantika, certe virino rajtas esti tia. Ĉu vi do opinias, ke nia intelekto, krom se temas pri ciferoj kaj formuloj, tre multe atingis?

JAMES: Mary, malnova kamarado, iono- kaj izotopo-fuŝulino!

MARY: Fuŝuloj ni estas, jes, sed en homa senco.

JAMES: Jen, vi vidas, ke oni povas veni al neatenditaj opinioj, se oni....

MARY: Se oni prenas paŭzon por ekspiri.

JAMES: Mi ne forgesos, Mary, ke ni kune, meze de la ĥaoso, tamen haltis por momento.

MARY: Kaj ĉu ni nun denove ĵetu nin en la ĥaoston por fine fini la raportojn?

GEORGE (*venante tra la pordo maldekstre*): Nu, tio estas en ordo. Kioma horo precize estas?

MARY: La kronometro kuŝas proksime de vi, James.

JAMES: Estas precize dek minutoj post la naŭa.

GEORGE: Donu ĝin al mi, ĉar je la naŭa kvardek mi devos averti Harris, ke li malkomutu.

(Du-sona alarmsonorilo komencus malrapide sonori. La ruĝa lampo sur la komutila tabulo eklumas, la verda estingiĝas. Ĉiuj rigardas kvazaŭ ŝtoniĝintaj en la direkto de la tabulo kaj poste ekpaŝas al ĝi).

MARY: La pilo!

GEORGE (*faras dum kreskanta konsterniĝo kelkajn komutojn, poste fingre montras la mezurilojn*): James, proksimiĝas la kriza temperaturo!

JAMES: Tio okazis ankaŭ en la pasinta nokto por kelkaj momentoj. Alreguligu!

GEORGE: Ne eblas. . . . La temperaturo daŭre leviĝas. . . . La reguligilo rifuzas!

JAMES: Permesu al mi, mi petas. Ĉi nokte estis same en la komenco. *(Li faras kelkajn komutojn)*. . . . Ne.

GEORGE: Ĝi tute ne moviĝas. Kiom longe daŭris ĉi nokte la unua perturbo?

MARY: La montrilo haltis! *(Si komencas angore, kvankam ne panike iradi tien kaj reen tra la laboratorio)*.

JAMES: Daŭras pli longe ol la pasintan nokton. Tio ĉi ne bone finiĝos! La temperaturo devas malaltiĝi kaj tiu mezurilo ne reagas!

GEORGE: Kaj per la rezerva kondukilo?

JAMES: La rezerva kondukilo ne funkcias: ne estas kurento.

GEORGE (*iras al la telefono kaj turnas numeron; al Mary*): Ĉesigu la sonorilon!

MARY (*ĉesigas la sonoradon*).

GEORGE (*en la telefono*): Ĉi tie la kontrolĉambro. Sendu tuj muntiston! La reguliga aparato denove malfunkcias.

(*Li remetis la mikrofonon; poste al James*): Nu?

JAMES: Nenio. Konstante.

GEORGE: Tio malbone finiĝos. La temperaturo nepre devas malleviĝi!

JAMES: Sed se ĝi ne malleviĝos, se la perturbo ne povos esti ĝustatempe riparita?

GEORGE: Tiam? Tiam ni ĉiuj kune, ĉu ne? . . . Tiam ĉio pereos.

JAMES: Tiam, George, per viaj vortoj: tiam ni estos kun-trenataj en moviĝon, kontraŭ kiu la unuopulo nenion povos fari!

GEORGE: Flatas min, ke en ĉi tiu momento vi citas miajn vortojn, sed mi preferas vidi, ke la temperaturo malleviĝas.

MARY: Ĉu ni nun ne devas fari grandan alarmon?

JAMES: Laŭ la regularo, jes. Ni tamen atendu momenton. Cetere ĝi estas sensencaĵo; paniko sen celo. Se okazos katastrofo, ĝi estos afero de minutoj, kaj neniu mortemulo eskapos.

MARY: Pro la ĉielo, kial ne venas la muntisto? (*Oni frapas*).

GEORGE: Eniru, rapide!

MAKS (*eniras dekstre*): Kio estas. . . .

GEORGE: Jen! (*Li fingre montras la ruĝan lampon*).

MAKS (*teruriĝas*): Difekto!

JAMES: Jes, denove. La reguligilo. . . .

MAKS: Granda ĉielo!

JAMES: Restu trankvila kaj esploru bone! Rapidu! Ankaŭ la rezerva kondukilo ne funkcias.

MAKS (*provas per provlampo ĉe la komutila tabulo; turnas butonojn*): Tute sen kurento!

JAMES: Restu trankvila! Ne minacas tuja danĝero. Esploru la aferon funde.

MAKS: Ne estas kurento. Nenio estas farebla. Mi nenion povas fari.

GEORGE: Kaj la mezurilo leviĝas!

JAMES (*komutas*): Efektive!

MAKS (*rigardas la mezurilon kaj volas forkuri*): Jezuo, Maria!

JAMES (*retenante lin*): Restu tie ĉi!

MAKS: Lasu min iri! (*Li elŝiras sin*): La tuta afero eksplodos!

JAMES: Idioto!

MAKS (*rapide forirante*): Helpu, forkuru, helpu!

JAMES: La viraĉo kaŭzos panikon.

GEORGE: Nun ankoraŭ dek gradoj.

JAMES: Ĉu dek?

GEORGE: Naŭ!

JAMES: Ni do faru alarmon!

MARY (*premas butonon apud la kirasita pordo. Ekstere ekmuĝas alarmaj fajfilegoj*).

GEORGE (*parolante en la telefono*): Ĉi tie la kontrolĉambro. Ni faris alarmon. Reguligilo de la pilo rifuzas je ambaŭ kondukiloj. Kriza temperaturo atingota post kelkaj gradoj. Ceestas Thomson, Holms, Benner.

JAMES: Nun la montrilo denove haltis. La moviĝoj estas konvulsiaj.

GEORGE: Sed la leviĝo de la temperaturo daŭras, kvankam kun skuoj.

JAMES: Jes, ŝajnas, ke nun estas certe. Mary kaj George, se vi volas foriri... Unu devas resti por agi, kiam la kurento de la elektrejo eventuale revenos... Mi ankoraŭ havas deforon, la raporto ankoraŭ ne estas transdonita...

GEORGE: Mi restos.

MARY: Ankaŭ mi.

JAMES: Vi ambaŭ restos?

GEORGE: Mi havas deforon. Cetere, forkuri estas vane.

Mi prefere troviĝas en la centro, por ke mi tuj... Kiu sidas plej proksime ĉe la forno...

MARY: Ankoraŭ ok gradoj!

JAMES: Kaj la kurento ankoraŭ ne revenis!

GEORGE (*rigardante tra la fenestro*): Jen, ili foriras! La laborejoj senhomiĝas. Kompatinduloj! Eĉ ne unu el ili eskapos!

MARY: Nek ni. Estas terure!

JAMES: Neniu eskapos, se ne....

GEORGE: Se ne — kio?

JAMES: Se ne tamen *unu* homo kapablus interveni en la la irado de la okazantaĵoj.

MARY: James! George! Ankoraŭ nur ses gradoj!

JAMES: Mary, ĉu vi timas?

MARY: Ne!.... Jes, tre.

JAMES: Ekzistas nur unu eblo.

GEORGE: La kadmiaj platoj!

JAMES: Jes, iri malsupren, mem enpremi la platojn, bremsi la proceson, George!

GEORGE: Sed tio egalas sinmortigon; tio rezultigos teruran, malrapidan morton per G am m a-radioj!

JAMES: Sed *unu* povas savi la vivon de miloj!.... Ni nun havas ankoraŭ kvin gradojn.... (*Li iras al la kirasita pordo kaj prenas la ŝlosilon el la ŝranketo*): Ĝi okazu!

MARY: James!

GEORGE: Lasu *min* Mi ne havas familion....

JAMES: Ne, mi.... (*Fortatire li malfermas la pordon kaj malaperas*). Ambaŭ konsternite postrigardas lin).

MARY: Dio helpu vin!

GEORGE: Li sola....

MARY: La malkuraĝa heroo....

GEORGE: Kaj eble eĉ vane.... Nur tri gradoj!

MARY (*interplektas la manojn kaj preĝas*): Patro nia, kiu estas en la ĉielo. Via noma estu sanktigata....

GEORGE: Li venas tro malfrue....

MARY: Venu via regno....

GEORGE: Nur du gradoj....

MARY: Plenumiĝu Via volo....

GEORGE: Plenumiĝu.... (*Kriante*) Mary!.... Jen!
....Gi malleviĝas! La montrilo malsupreniras....! Li suk-
sesis!

MARY (*ploras kun la kapo sur lia ŝultro*).

GEORGE: Savitaj!

(KURTENO)

DUA AKTO.

Loko de agado: la loĝoĉambro de la familio Thomson. Dekstre kaj maldekstre en la malantaŭa muro estas pordo, en la maldekstra muro estas fenestro. Inter ambaŭ pordoj staras libroŝranko. Ĉe la maldekstra muro staras ŝranketo, super kiu pendas spegulo; apude staras malalta tableto kun radioaparato. En la mezo tablo kun kelkaj ŝegoj. Lumigo el diversaj lokoj, ekz. per murlampoj kun ŝirmilo, lampo super la tablo, malforta „krepuska” lampo. Sur la ŝranketo kaj la libroŝranko kelkaj bukedoj. Sur la tablo vazo kun rozoj. Estas posttagmezo.

Kiam la kurteno leviĝas, James sidas ĉe la tablo kun la fingropintoj en la oreloj, por ke li ne aŭdu la kantadon kaj la bruon de la najbaroj sonantajn tra la malfermita fenestro. Kiam ĉesas la bruo, iu frapas.

JAMES: Eniru!

ANNA (portante florojn, eniras tra la dekstra pordo): Jen, denove bukedo; la fluo ne ĉesas.

JAMES: Metu ĝin ien. La ĉambro tro pleniĝas.

ANNA: Ŝajnas, ke vi ne tre ĝojas pri ĉi tiuj belaj floroj.

JAMES: Kial mi ĝojus?

ANNA: Vi ja plene meritas ilin! Ne estas bagatelo tio, kion vi faris. Ĉiu parolas pri via ago.

JAMES: Ordinara afero, kiam okazis io eksterordinara. Post kelkaj tagoj ĉiu estos forgesinta tion!

ANNA: Tion la homoj ne tre baldaŭ forgesos, kaj mi certe ne! Kiu povus antaŭvidi, ke vi iam faros tion! Estante knabo, vi ĉion difektis, kaj nun vi savis tutan urbon! Se via patrino tion estus ĝisvivinta!

JAMES (ironie): Ne estas bagatelo, ĉu? Tutan urbon!

ANNA: La homoj tion diras.

JAMES: Kaj se la homoj tion diras... Sed nun pri alia temo, Anna: nepre ne plu enlasu ĵurnalistojn aŭ foto-

grafojn!

ANNA: Mi tenos la pordon riglita kaj diros, ke vi ne estas hejme. Ĉu bone? Sed nun *vi* faru, kion *mi* konsilos.

JAMES: Ke mi manĝu? Ne!

ANNA: Eĉ se nur bagatelon: kelkajn pantranĉojn kun fromaĝo.

JAMES: Mi ne havas apetiton; eĉ la nura penso pri manĝo naŭzas min.

ANNA: Do almenaŭ trinku ion; mi havas bonegan kokinan buljonon.

JAMES: Vi ne cedos, ĉu?

ANNA: Ĝi bone efikos al vi, kaj poste vi iom ripozu.

JAMES: Ankoraŭ ne. Eble post la vizito de Mary.

ANNA: Kaj la buljono? (*Aŭdiĝas jubulado kaj bravo-kriado ĉe la najbaroj*).

JAMES: Nu, bone, mi konsentas. Kaj, Anna, fermu la fenestron, por ke mi ne tiom aŭdu tiun blekadon.

ANNA: Sed jam estas sufoke tie ĉi. (*Malantaŭe tintas la telefono*).

JAMES: La blekado frenezigas min.

ANNA: Vi bezonas dormon. (*Ŝi fermas la fenestron; malantaŭe tintas la telefono denove*).

JAMES: Kaj ankaŭ malkontaktu la telefonon.

ANNA: Mi faros. (*Ŝi foriras dekstre*).

JAMES: Ankoraŭ pli da floroj. (*Li glitigas la leterojn tra la manoj*). Kaj telegramoj kaj ekspresaj leteroj. . . . kva-zaŭ estas festo. Kial ne? Por ili estas festo: festo de reviviĝo. (*Li ekstaras antaŭ la spegulo kaj rigardas sin*): Ankoraŭ nenio estas videbla. Kompreneble, ĉar tiom rapide la proceso ne iras. La naturo havas tempon. (*Li denove eksidas*). Nur laca, lacega, kaj mia kapo doloras, sed tion ĉi kaŭzis eble la emocio. (*Rigardante siajn manojn*): Ili faris tion, ili. . . . ili kaj mi. . . . kiu mi? Cio ankoraŭ estas normala; ili estas ordinaraj, sanaj manoj. . . . (*Ĉe la najbaroj denove aŭdiĝas jubulado*). Fulmotondro!

(*La maldekstra pordo estas malfermata kaj Anna eniras kun taso da buljono*).

ANNA: Jen, trinku tion ĉi kun ĝuo; ĝi resanigos vin.

JAMES: Mi resaniĝos, vi diras? Mi dezirus, ke mi povu kredi vin.

ANNA: Ĉu vi do *ne* povas? Ĉu ekzistus iu ajn, kiu scias pli bone ol mi, kio utilas al vi? Tiel estis en via junaĝo, tiel estas ankoraŭ nun, kvankam vi nun fariĝis granda sinjoro, famulo, pri kiu ĉiu parolas, speco de heroo.

JAMES: Jes, jes, miriga speco de heroo!

ANNA: Ĉu ne estas tiel? Sed nun trinku, por ke ĝi ne malvarmiĝu.

JAMES: (*prenas kontraŭvole gluteton*): Ne, mi vere ne ŝatas tiun varmegan koton kaj tiun viandguston.

ANNA: Koton?

JAMES: Ĝi estas naŭza! Kaj nun ĉesigu vian mueladon pri manĝaĵo kaj trinkaĵo!

ANNA: Do poste, kiam ĝi estos iom malvarma.

JAMES: Ne, ne, ne! Kaj ne plu ĝenu min!

ANNA: Nu, nu, trankviliĝu; mi ne volas veneni vin!

JAMES: Ne, Anna, mi scias bone, ke vi faras tion kun plej bonaj intencoj, sed mi ne povas trinki ĝin, mi ne povas ĝin toleri. (*Denove sonas jubilado ĉe la najbaroj*). Sed vi povas fari al mi grandan plezuron. Ĉu vi volas?

ANNA: Ĉiam. Diru nur, *kion* mi devas fari.

JAMES: Iru al la najbaroj kaj petu, ke ili ne faru tiom multe da bruoj.

ANNA: Ili havas feston; sinjoro John ricevis la arĝentan medalon....

JAMES: Mi deziras al li ankaŭ la oran, kondiĉe, ke ili ne tiom kriadu. Petu ilin!

ANNA: Bone (*Ŝi foriras*).

JAMES: Medaloj kaj floroj: ĉiuj bonaj agoj estas rekompenkataj

(*Li prenas libron, sed remetas ĝin; poste denove ekstaras*

antaŭ la spegulo kaj sin rigardas). En la okuloj kaj ĉi tie la neŝirmitaj mukozoj. Sensencaĵo....! Mi ne cedu(Li iras tien kaj reen kaj prenas bukedon en la mano):

Kvazaŭ sur enterigejo, la atmosfero de tombejo, jam nun!
(Li priŝarlas la florojn: Ba, dolĉa malbonodoro, putro!
(Li ĵetas la florojn sur la plankon, momenton rigardas ilin, poste iras al la pordo dekstre kaj ĝin malfermas):
Anna!.... Anna!.... Kie vi do estas?

ANNA (enirante): Mi ja devis peti ĉi apude.... Sinjoro John volis kuniri por gratuli vin, sed mi retenis lin, dirante....

JAMES: Tre bone. Mi neniun volas vidi, escepte de fraŭlino Mary kaj sinjoro George.

ANNA: La najbaroj trinkis je via sano.

JAMES: Ili estas tre afablaj!

ANNA: Betty diris.... (Vidante la florojn sur la planko):
Jen, la floroj.... Ĉu vi ĵetis ilin sur....

JAMES: Jes! Ilia naŭza odoraĉo malsanigas min; la kaŭzo de mia kapdoloro.

ANNA: Ĉiuj fenestroj ja estas fermitaj, kaj krome estas varmege.

JAMES: Forigu tiujn aferojn, sed ne la rozojn de fraŭlino Mary.

ANNA: Ĉiujn tiujn florojn?

JAMES: Jes kaj fermu la kurtenojn kaj eklumigu la lampojn.

ANNA: Ĉu dumtage, kiam la suno plene brilas?

JAMES: Ĉiujn lampojn.

ANNA (maltrankvile kaj suspekta): Mia James, kio estas al vi? Via konduto estas stranga. Kio premas vin?

JAMES: Nenio.

ANNA: Io vin ĝenas. Min vi ne povas erarigi!

JAMES: Nur faru, kion mi petis, Anna.

ANNA (fermante la kurtenojn kaj eklumigante la lam-

pojn): Deziras la fenestrojn fermitaj, kurtenojn fermitaj, la lampojn lumantaj, ĵetis la florojn sur la plankon kaj nur malafablas. Mi ne afliktiĝas pro tio, ho, tute ne, eĉ se vi agus ankoraŭ pli freneze. . . . (*Seniluziigite*): Sed ke vi evitas respondon, ke vi traktas min kvanzaŭ mi estas fremdulino. . . .

JAMES (*pli milde*): Vi ne estas fremdulino kaj mi ne havas motivaĵon por koleri kontraŭ vi. Kial mi kontraŭ vi koleirus, mia kara maljuna Anna? Sed vi estas prava, estas mi, kiu kulpas. Mi estas iom malmultvorta kaj malafabla. Ne ĉagreniĝu!

ANNA: Mi ne ĉagreniĝas, kaj se tio malpezigas vian koron, vi malaflablu sentime kaj senlime. Sed ne pri tio temas.

JAMES: Pri kio do?

ANNA: Vi prisilentas ion antaŭ mi. Io stranga okazis al vi.

JAMES: Stranga, jes, vere, io tre stranga.

ANNA: Vi ne plu fidas min. Vi ŝanĝiĝis, vi iĝis alia. . . .

JAMES: Mi efektive estas alia, Anna, tute alia ol antaŭ kiam mi . . . e . . . ol antaŭ kiam mi savis tiujn homojn. Io tia pasas ne sen sekvoj, ne, nepre ne sen sekvoj. . . . Nu, forigu tiujn florojn kaj poste. . . .

ANNA: Kaj poste?

JAMES: Poste preparu kafon, tason da forta kafo.

ANNA: Bone, kafo. (*Ŝi foriras kun floroj, sed maltrankvile haltas por momento ĉe la pordo*). Almenaŭ tion vi ankoraŭ konfidis al mi (*Malaperas*).

JAMES: Kara Anna! Kial mi dirus tion al ŝi? Ne, mi ne parolu pri tio, mi ne daŭrigu la turniĝadon en tiu cirklo. Ĝi obsedus min. Mi devas fari ion, serĉi distron. (*Li funkciigas la radio-aparaton kaj poste iras tien kaj reen tra la ĉambro*): Ankaŭ tio ne eblas; ho, mia kapdoloro! (*Li malfunkciigas la radio-aparaton; prenas rozon kaj priflaras ĝin*): Floroj de Mary, . . . Eble jam antaŭ ol ili estos velkintaj, mi. . . . Oĥ, absurdaĵo! (*Li aperigas revolveron kaj dum momento ĝin rigardas, poste remetis ĝin en sian*

poŝon).

ANNA (*venas tra la pordo dekstre; volas forpreni ankoraŭ pli da floroj*): James, vi nun trankvile aŭskultu min kaj ne ekkoleru.

JAMES: Eĉ ne unu momenton mi koleris kontraŭ vi. Vi nur ne denove komencu paroli pri manĝo.

ANNA: Ekzistas io, pri kio vi evitas paroli, James. Mi ne scias, *kial*. Mi ne funkciigis la radio-aparaton, sed Betty de la najbaroj mem aŭdis....

JAMES: Kion ŝi aŭdis?

ANNA: Ĉu estas vere? Ĉu el via ago postrestis al vi io terura? Ĉu vi estas tuŝita de la danĝeraj radioj?

JAMES: Tuŝita?

ANNA: Vi tre bone scias, kion mi volas diri. Ĉu al vi okazis io simila kiel al la kompatinda profesoro White, kiu pro tiuj radioj devis perdi unue siajn fingrojn, poste sian tutan manon? Tion vi ja memoras ankoraŭ?

JAMES: Certe, sed tio estis....

ANNA: La veron, James! Mi ja rajtas scii, kio al mia knabo.... Ĉu vi do ne estas ankoraŭ iomete mia knabo?

JAMES: Jes, Anna, tio mi restas: via knabo. Sed estas tiom malfacile, ĉio estas tiom komplikita kaj ni ne ĉiam scias....

ANNA: Sed antaŭe ni bone sciis. Kiam vi faris bubajon, kiam vi iel miŝkonduktis, tiam vi turnis vin unue al mi, ne al via patrino.... En viaj okuloj mi jam povis legi tion; mi bezonis nur rigardi por ekscii, ke okazis io malbona....

JAMES: Nu, Anna, rigardu do ankaŭ nun en miaj okuloj kaj diru, kio okazis....

ANNA: Stranga knabo!

JAMES: Ne, efektive, mi parolas serioze. Rigardu en miaj okuloj, klopodu vidi tion.... Ekstaru tie ĉi.... Bone. Nun rigardu min, bone rigardu. Ĉu vi vidas en mi ion neordinaran?

ANNA: Nur en viaj okuloj; ili estas maltrankvilaj.

JAMES: Ĉu plie nenion?

ANNA: Ne.

JAMES: Ĉu nenion en la okulblanko, mia vizaĝo, mia haŭto?

ANNA: Kion mi devus vidi?

JAMES: Oĥ, ne, kompreneble vi vidas nenion. Nur en miaj okuloj: kion vi vidas en ili, tio estas angoro.

ANNA: Angoro, pro kio?

JAMES: Ĉu vi iam efektive timis, Anna?

ANNA: Mi timas *nun*, mi timas nun same, kiel en la vespero, kiam vi estis ironta al la fronto kaj venis hejmen en via oficira uniformo por adiaŭi. Kiam vi trinkis tie ĉi viskion kun viaj amikoj kaj ridis, tiam mi sidis en la kuirrejo, sola kaj en timo.

JAMES: Tio estis io alia.

ANNA: Ne por mi.

JAMES: Sed por mi. Tamen ne tion mi volis diri. Se vi sciis, ke vi tre baldaŭ mortos, ni diru: post unu semajno, ĉu tiam vi timus?

ANNA: James! Tio ja ne estas vera, vi ja ne parolas serioze! Vi certe ne volas diri, ke. . . .

JAMES: Ne pri mi mem mi parolas.

ANNA: Pri kiu alia vi parolus? Do pro tio vi demandis, ĉu mi povas vidi en vi ion neordinaran. Ja ne eblas, James, ke vi, sana, fortika viro, kiu neniam estis malsana. . . . Tio ja estas absurda!

JAMES: Absurda. Sed estu nun trankvila. Tio, kion mi diris pri la sekvonta semajno, estas sensencaĵo.

ANNA: Ĉu vi diras la veron?

JAMES: La veron. . . . Nur rigardu en miaj okuloj.

ANNA: Aĥ, mi dezirus, ke ankoraŭ estu tiel! Mi dubas, mi dubas. Ni neniam estu venintaj ĉi tien, al ĉi tiu abomeninda fabriko! Antaŭe, kiam via patro instruis ĉe la universitato la studentojn, tiam ĉio estis trankvila; tiam ni vivis agrable kaj bone. Sed nun daŭra pelado kaj zorgoj

kaj ekscitiĝo. Nun ne plu venas studentoj, kiuj ridas, sed altranguloj en uniformoj, aŭtoritatuloj, kiuj havas sekretojn kaj kiuj flustras, kiam oni eniras la ĉambron. El via patro oni ne plu povas aperigi afablan vorton. Nokte li iras tien kaj reen tra sia ĉambro kaj glutas pilolojn, ĉar li ne povas dormi. Por kio? Kial la homoj ne vivas ordinaro? (*Oni sonorigas*).

JAMES: Jes, kial?

ANNA: Jen, verŝajne via patro. La pordo estas ankoraŭ riglita. (*Ŝi foriras*).

JAMES: Kial la homoj ne vivas ordinare?

Prof-o THOMSON (*emociite eniras tra la dekstra pordo*):
James, . . . mia filo . . . (*Li kaptas liajn manojn*).

JAMES: Patro!

Prof-o THOMSON: Ke tio devis okazi, ĝuste kiam mi forestis . . . Mi aŭdis pri ĝi per la aŭto-radio, kaj mi petis Atkins tuj veturi returne . . . Diru al mi, James, ĉu estas vere, ke vi mem . . . vi mem, sola . . . eniris la transmucaciejon?

JAMES: Jes, Patro.

Prof-o THOMSON: Kaj la platojn de la pilo vi mem, senkonsidere . . .

JAMES: Ĉu mi povis agi alie?

Prof-o THOMSON: Granda ĉielo, knabo, tio estas terura!
Mi esperis, ke la radio-informoj evidentiĝos troigitaj . . .
Terure, terure!

JAMES: Troigitaj? Ne en ĉi tiu rilato. Troigitaj estas la laŭdokantoj pri mia heroeco; ili estas kolerigaj.

Prof-o THOMSON: Sed vi ja faris tion! Estis ja vi, kiu malbligis teruran katastrofon. Vi faris pli multe ol iu ajn homo iam . . .

JAMES: Jes, ol iu ajn homo iam farus, se li antaŭe estus pripensinta tion. Ĉu tio savos min? Mi ricevis la plenan atakon de la radioj, tion oni jam ne povas malfari.

Prof-o THOMSON: Kiom longe, precize, vi estis malsupre?

JAMES:*(incitite)*: Oĥ, Patro, ĉesigu tiun sensencaĵon! Tiun demandon vi ja ne povas fari serioze! Ĉu efektive estus diferenco, se mi estus tie kvin aŭ kvindek sekundojn? Kiel ajn, mi ricevis pli multe ol homo povas toleri. Mia fino estas veninta, tion vi scias same bone kiel mi.

Prof-o THOMSON: Ĉu vi almenaŭ tuj submetis vin al medicina kontrolo? Ĉu vi parolis kun doktoro Clark?

JAMES: Ne, Patro, ne klopu etendi al mi pajleron! Ni kune konsideru la faktojn!

Prof-o THOMSON: Jes, James, tion ni faros. Estu trankvila. Sed ĉion, eĉ absurdaĵon ni devas provi.

JAMES: Nenio estas provebla. Ni povas nur akcepti la konsekvencojn. Miaj horoj estas kalkulitaj.

Prof-o THOMSON: Ankoraŭ ne, tiom longe, kiam ne ĉio estas....

JAMES: Vi mensogas! Cetere via tuta teniĝo estas duflanka, struta politiko: se oni metas sian kapon en la sablon, danĝero ne ekzistas! Ridige! Ne klopu por mi.... Mi ne povas diri, ke mi ne timas, sed mi estus almenaŭ pli trankvila kaj havus pli da paco pri mia situacio, sciante, ke la atmosfero inter ni estas pura. Nenia trompo pro mia bono! Ĉu vi konsentas, Patro?

Prof-o THOMSON: Ni do klopu resti raciaj, James; ni ambaŭ penu eviti miskomprenon.

JAMES: Do neniam falsaj iluzioj! Mi volas precize scii, kiel vi opinias pri mia situacio. Tio, kion aliaj pensas aŭ diras, estas indiferenta al mi. Do, sen elturniĝoj: kiom longe, laŭ via opinio, mi ankoraŭ vivos?

Prof-o THOMSON: Vi scias same bone, kiel mi, ke ĉi tiun demandon oni ne tuj povas respondi kun certeco.

JAMES: Kaj vi scias same bone kiel mi, ke detaloj ĉi tie ne ludas rolon kaj ke respondo do estas ebla. Antaŭ ol ni povos daŭrigi nian interparoladon, vi konfesu, ke venis mia fino.

Prof-o THOMSON: Tion mi ne povas tuj konfesi. Mi devas

deteni min de juĝo, riskante, ke vi ree suspektos min, ke mi serĉas elturniĝojn. Mankas al ni sufiĉa sperto por juĝi kun absoluta certeco. Sub tiu ĉi kondiĉo mi devas konsenti, ke via . . . ke via ŝanco estas, oh ve, tre malgranda, tiom malgranda, ke ĝi apenaŭ povas doni motivon por esperi.

JAMES: Tion mi aludis, Patro. . . . kredu al mi, ke mi komprenas, ke la eldiro de ĉi tiu. . . . e. . . . verdikto por vi ne estas malpli grava ol por mi. Tamen mi estas danka al vi, ĉar mi nun scias almenaŭ, ke vi parolis sincere.

Prof-o THOMSON: Kaj tamen mi ne rajtas ne insisti akcente, ke vi konsultu kuraciston.

JAMES: La kuracistoj havas tro malmulte da sperto kaj se ili scias iom, ili estas senpotencaj.

Prof-o THOMSON: Kaj tamen vi parolu kun doktoro Clark kaj profesoro Burnham, eĉ se nur por kontentigi min.

JAMES: Ofendo al nia sana prudento!

Prof-o THOMSON: Ofendo, kiun mi volonte toleros pro. . . . pro. . . .

JAMES: Pro la sintrompo?

Prof-o THOMSON: Pro la konscio, ke ni lasis nenion neprovita.

JAMES: Se tio estas bona por via animtrankvilo — mi konsentas.

Prof-o THOMSON: Mi do povas voki doktoron Clark?

JAMES: Vi nur ne atendu, ke Clark sukcesos injekti al mi falsan esperon.

Prof-o THOMSON: Ĉi tiu punkto ja estas findiskutita? Vere, mi ne estas tiom struta, kiom vi opinias.

JAMES: Vi eraras, Patro. Vi nur memoru nian interparolon hodiaŭmatene en la laboratorio.

Prof-o THOMSON: Ĉu necesas reveni al ĝi? Kial ni, ĝuste nun, refreŝigus tiun dolorigan historion?

JAMES: Mi jam ne havas tre multe da tempo. Kaj kial ĝi estus doloriga?

Prof-o THOMSON: Vi diris aferojn... nu, kompreneble en via ekscitiĝo.

JAMES: Ĉu vi aludas la kunkulpecon pri amasmurdado?

Prof-o THOMSON: Ekzemple.

JAMES: Tion vi ne bezonas kompreni kiel personan riproĉon. Eĉ se ni plene malsamopinius, mi nenion volus riproĉi al vi... Por tio... por tio... mi havas tro multe da kialoj esti danka al vi... Mi do pli singarde esprimu min, dirante, ke ĉiuj, kiuj helpis utiligi la atomenergion al pereigaj celoj, estas kune respondecaj. Al tiuj homoj apartenas ankaŭ mi, eĉ ankoraŭ nun!

Prof-o THOMSON: Estas eraro, ne disigi la sciencon for de la politiko.

JAMES: Ĉu ne pli vere estas eraro de ni ĉiuj, ke ni vidas inter tiuj du diferencon, kiu ne ekzistas? Ĝi eble estas penseraro, sed ĝi ne liberigas nin de nia respondeco.

Prof-o THOMSON: Respondecon oni povas akcepti nur pri tio, kion oni mem faras.

JAMES: Aŭ *igas aliajn* fari! Tio estas kunkulpeco!

Prof-o THOMSON: James, ĉu jam longe vi havas ĉi tiujn... ĉi tiujn konsciencajn skrupulojn?

JAMES: Jes, sed en la lasta tempo ili premis min pli kaj pli peze. La okazintaĵo kun la provbombo estis por mi decida. Tiam mi komprenis, pri kio ni okupas nin.

Prof-o THOMSON: Tio ja ne kostis eĉ unu viktimon!

JAMES: Patro, ĉesigu tiun babiladon! Tio ne kostis viktimojn! Vere, sed ilia vico venos poste: miloj, milionoj da viroj, virinoj kaj infanoj, junaj viroj en floranta aĝo kiel mi... Ĉu vi scias, kion signifas esti juna kaj forta kaj havi bestan deziron por vivi? Ĉu vi scias, kion signifas esti sana, sopiri amon, esti kreita laŭ la bildo de Dio... Dio helpu nin!... (*Li ridas maldolĉe*): Kaj tiam, meze en ĉi tiu plena vivo, ricevi la venenon de la morto ĵetitan en la korpon, ne per naturkatastrofo, sed per via kaj mia laboro, per homa laboro? Mia Dio, homa laboro oni nomas

tion, inteligenteco! Estas plorige, plorige, plorige!

(*Li ploras — ripozas*): Neniu kaj nenio povos ŝirmi sin, nek besto, nek infano, nek virino, nek Mary.... Mary....

(*Li ploras denove kaj estas tre malforta*).

Prof-o THOMSON: James, filo mia....

JAMES: Aĥ, Patro, vi ja scias, kiom terure vera estas tio, kion mi diras.... kiom maltrankvila vi mem estis tiutempe, kiam iuj fotografaj platoj el ĉiuj anguloj de la mondo estis resendataj al la fabrikistoj, ĉar ili estis vualigintaj, fuŝigintaj pro tio, ke ili estis enpakitaj en kartono farita el pajleroj, kiuj kreskis en distanco de pli ol ducent mejloj de la loko, kie la provbombo eksplodis. Abomeninde: preskaŭ unu jaron poste ĉi tiu kartono ankoraŭ estis radio-aktiva kaj detruis la fotografajn platojn. Ĉu vi ankoraŭ rememoras, kion vi tiam diris?

Prof-o THOMSON: Ne.

JAMES: Ne, kompreneble ne, vi forgesis tion. Sed *mi* ne forgesis. Knabo, vi diris, mi ne plu havus trankvilan momenton, se okupus min la penso, kio povus okazi, se ĉi tiu afero forglitus el nia kontrolo. Ĉu vi ankoraŭ rememoras?

Prof-o THOMSON: Certe.

JAMES: Mi frostotremis pro tio, kaj kiam mi diris, ke mi timas, vi respondis: Jes, knabo, oni devas esti atenta, por ke ĉi tiu mondo ne putraĉu.

Prof-o THOMSON: Mia opinio ne ŝanĝiĝis. Ni devas esti tre singardaj, ni devas zorgi, ke tiaj akcidentoj ne okazu.

JAMES: La tuta mondo putraĉos, jen la vortoj, kiuj igis min pripensi. Kiuj putrigas ĉi tiun mondon? Ni, la scienculoj, la respondeculoj, kiuj transdonas tiajn danĝerajn armilojn en la manojn de tiaj sinjoroj, kiaj la Greenway-oj.

Prof-o THOMSON: Greenway reprezentas nur la ŝtaton, kiu havigis al ni la milionojn, la homojn kaj la materialojn por nia esplorado. Tio donas al ĝi la rajton pri la rezultato de nia laboro.

JAMES: Ĉu rajton? Misuzon! Per siaj milionoj ĝi aĉetis vin

kaj min kaj ĉiujn aliajn; ĝi aĉetis la sciencon. . . .

Prof-o THOMSON: Sed vi forgesas, ke niaj esploroj ne estus eblaj, se la ŝtato ne financus ilin. Se ni volas daŭrigi nian laboron, ni devas akcepti la konsekvencon, ke ni devas cedi la rezultatojn.

JAMES: Tiam estus pli bone, se la laboro ne estus farita. Ĉi tiu tasko estas tro granda por unu sola grupo da homoj, por unu sola popolo. Oni devus esti atendinta ĝis tiu ĉi afero estos utiligebla al la tuta homaro.

Prof-o THOMSON: Eble jes. Sed la evoluo okazas ne nur, kaj eĉ ne ĉefe, laŭ pure etikaj principoj. Ja ne estas alie kaj ni devas rezignacii.

JAMES: Ne, ni devas klopodi ŝanĝi tion.

Prof-o THOMSON: Ĉu vi vidas vojon, eblon?

JAMES: Jes! En niaj pro scio tro pezaj kapoj ni devas fari lokon por la kompreno, ke tiel ni ne daŭrigu. Vi kaj mi, ni ĉiuj, kiuj scias, estos la plej kulpaj, se ni daŭrigos tiel. Nur unu afero estas farenda: ni devas komenci per ni mem; rifuzi nian kunlaboron al la pereigo de ĉi tiu mondo; ne transdoni vian Piradiumon en la manojn de la Greenway-oj.

Prof-o THOMSON: Tio ne estas ebla, James, mia devo. . . .

JAMES: *Nun* tio ankoraŭ estas ebla, poste ne plu; tiam estos tro malfrue. Patro, mi staras antaŭ la morto. Ĉi tiuj rozoj de Mary verŝajne postvivos min. Antaŭ kelkaj horoj mi iĝis vidanta, plene vidanta. Mi postulas vian rifuzon. Se vi ne konsentos, mi kulpigos vin pri murdo, estonta murdo de junaj vivoj, kiel la mia kaj la ŝia. . . . Se vi *nun* restas malkuraĝa, mi ne plu konsideros vin mia patro, sed perfidulo, malamiko. . . . Parolu!

Prof-o THOMSON (*malfacile*): Mi ne povas, James.

JAMES: Do. . . . vi transdonos la raporton, vi, kiu scias?

Prof-o THOMSON (*mallaŭte*): Mi ne scias. . . .

JAMES: Vi ne scias? (*Li prenas revolveron*): Vi ne scias?
(*Li celas la revolveron al li*): Elektu, ĉar urĝas: la mondo

ne havas atendejon!

Prof-o THOMSON (*timigite rektigas; rigide*): Per nenia potenco mi lasos devigi min! (*Kelkajn momentojn ili fikse rigardas unu la alian; fine James formetas la revolveron.*)

JAMES: Mi esperas, ke vi kondutos laŭ tio. (*Li faligas sin en seĝon kaj kovras sian vizaĝon per la manoj*).

Prof-o THOMSON: Vi tute konfuziĝis, James. Tiu ĉi kondutmaniero ne estas via. Mi ne rekonas vin.

JAMES: Ne, vi ne plu komprenas min, kaj mi vin. Vi ankaŭ ne komprenas kion signifas: la mondo ne havas atendejon. Komence ankaŭ mi ne komprenis tion. Nun, de antaŭ kelkaj horoj, mi scias, kion tio signifas, de tiam, kiam mi staris antaŭ la pilo por malhelpi katastrofon. Kia frenezo: de kiam mi ludis la rolon de homsavanto, mi estis pelata ĉi tien, prenis ĉi tiun malbenitan objekton por atenci vian vivon. . . . Pardonu min, Patro. Feliĉe nenio malbona okazis. . . . Cetere estus ja sensencaĵo: anstaaŭus vin iu alia. . . . Nenion ni povos gajni, se ni ne akiros la komprenon, ke ni devas uzi niajn fortojn ne kontraŭ, sed por la homaro. Mi nenion plu povos fari, mi estas iom ekscitita, sed mi staras. . . . komprenu tion, Patro. . . . mi staras ambaŭflanke de la sojlo. . . . Mi estas laĉa kaj volas ripozi iom.

ANNA (*venante de dekstre*): Jen estas fraŭlino Mary.

JAMES: Enlasu doktoron Holms.

ANNA (*foriras dekstre*).

Prof-o THOMSON: James. . . .

JAMES: Ni finparolis, Patro.

Prof-o THOMSON: Hodiaŭ vespere ni daŭrigos pri tio. Mi nun avertos doktoron Clark, kaj iros al la fabriko, ĉar. . . . e. . . . Greenway atendas min.

JAMES: Jes, vi iru.

Prof-o THOMSON: Ĝis baldaŭ; mi ne longe restos tie. (*Li foriras. Al Mary*): Adiaŭ, Mary.

MARY (*venante de maldekstre*): Adiaŭ, profesoro.

JAMES: Bonan tagon, Mary. Mi ĝojas, ke vi venis. Kiom belajn florojn vi sendis! Demetu vian mantelon kaj eksidu.

MARY: Ĉiuj lampoj lumas, kaj eĉ meze de la tago!

JAMES: Por hejmeco; estis al mi tro malgaje tie ĉi. Belegan jupon vi portas! Mi ankoraŭ ne vidis ĝin.

MARY: Ĉu vere ne? Mi ja kelkfoje ĝin portis en la laboratorio.

JAMES: Kiel estas eble! Mi neniam ĝin atentis.

MARY: Ĉar mi portis sur ĝi mian blankan surtuton.

JAMES: Eble pro tio.

MARY: Kien vi iris hodiaŭ matene, kiam vi forkuris el la laboratorio? George telefonis al via hejmo.

JAMES: Mi tuj forlasis la fabrikajn terenojn. Mi veturis horeton tra la arbaroj por retransviliĝi post tiu granda ekscitiĝo. Kiam mi venis hejmen, la ĵurnalistoj jam atendis min, altrudante sin kun foto- kaj film-aparatoj, kvaŭzaŭ mi estas ĉampiono pri boksado aŭ filmstelo. Mi estas lacega pro ĉio ĉi kaj havas teruran kapdoloron.

MARY: Do iom ripozu; ekkonu por kelka tempo!

JAMES: Eble poste. Ĉu vi deziras kafon? Momenton....

MARY: Restu sidanta. Mi petos Anna.

JAMES: Ĝi jam havas la kafon preta.

MARY (*foriras dekstre*).

JAMES (*oscedas kaj montras signojn de laceco; prenas sian frunton per la mano*).

MARY (*venante de dekstre*): Nu, tio estas en ordo.

JAMES: Ĉu vi jam venkis vian terurigaĵon?

MARY: Preskaŭ, kaj vi?

JAMES: Ne la terurigaĵo estis grava, sed la komenca paniko, kiam ni nenion povis fari.

(*Oni frapas*).

JAMES: Eniru!

ANNA (*eniras dekstre kun kafo*).

JAMES: Bone; dankon.

ANNA (*foriras dekstre*).

MARY: Ĉu mi enverŝu?

JAMES: Volonte. Vi agrabligu la atmosferon. Vidu, Mary, viaj floroj staras tuj antaŭ mi, sur la honora loko. La plimulton el la ceteraj mi forprenigis. Ĉu vi rememoras, ke ankaŭ iam antaŭe mi ricevis de vi rozojn?

MARY: Tre bone.

JAMES: Tio okazis, kiam mi revenis el la hospitalo. Ili estis flavaj kaj portis vizitkarton. Ĉu vi rememoras ankaŭ, kion vi skribis sur ĝi? „Al mia ŝatata kolego kaj bona amiko”.

MARY: Mi miras, ke vi ankoraŭ rememoras tion!

JAMES: Memkompreneble. Ekzistas iaj etaj okazintaĵoj, kiujn oni memoras pli longe ol gravaj faktoj. Image mi ankoraŭ vidas vin eniri la unuan fojon la kolegian salonon, kie instruis mia patro. Malgranda Mary. Jes, nun doktoro Holms, malgranda Mary (*Li premas per la mansian frunton*).

MARY: Kio estas al vi?

JAMES: Nenio, nur kapdoloro. Iom da kapturniĝo. Ignorution.

MARY: Do englutu ion kontraŭ tiu kapdoloro kaj ekkuŝu por kelka tempo.

JAMES: Ĉu nun, dum via ĉeesto?

MARY: Kial ne? Faru tion. Mi havas sufiĉe da tempo kaj dume iom legos, ĉar hodiaŭ mi jam ne iros al la laboratorio.

JAMES: Ne, mi restos ĉi tie, ĉe vi. (*Li frapas ŝian manon*): Ĉu vi volas manĝi ion?

MARY: Dankon; mi jam manĝis.

JAMES: (*ekstaras, iras tien kaj reen, rigardas sin sendecide, kvazaŭ li volas diri ion*).

MARY (*sekvas lin ŝtelrigarde. Siaj fingroj ludas per papereto*).

JAMES: Ĉu nerva?

MARY: Ne multe. Kial vi demandas tion?

JAMES: Nenial. (*Decide*): Mi tamen faros. Se mi prenos kelkajn pilolojn kaj ripozos etan kvaronhoron....

MARY: Faru trankvile. Ankaŭ George promesis veni. Harris havas la kontroldeĵoron.

JAMES: Vi ja atendos, ĉu?

MARY: Eĉ se daŭros unu horon.

JAMES (*prenante ŝian manon*): Do, ĝis baldaŭ.... eta Mary! (*Li foriras maldekstre*).

MARY (*postrigardas lin — prenas libron, sed ne atingas legadon; paŭzo; oni frapas*). Eniru!

ANNA (*eniras dekstre*): Ĉu vi deziras pli da kafo? Kie estas la sinjoro?

MARY: Li dormas por kelkaj momentoj. Vi povas forpreni la servicon, Anna.

ANNA: Estas bone, ke la sinjoro iris ripozi, li estas lacega kaj agas iel strange.

MARY: Ĉu strange?

ANNA: Tio estas la sekvo: se oni ne volas konfesi la veron, oni komencas agi strange. Komprenoble ankaŭ vi partoprenas la komploton. Ĉiuj havas sekretojn. Nia tuta fabriko estas unu granda sekreto.

MARY: Nia tuta fabriko? Pri kio vi do parolas?

ANNA: Pri kio mi parolus? Tion vi ja komprenas, ja ankaŭ vi estas nur ordinara virino, kvankam vi estas doktoro! Ĉu estas strange, ke mi estas maltrankvila pri sinjoro James?

MARY: Certe ne.

ANNA: Diru al mi sincere: Ĉu James estas malsana?

MARY: Kiel — malsana?

ANNA: Morte malsana, tre grave malsana, kvankam oni ne povas vidi tion je li. La radiostacio ja diskonigis, ke li estas tuŝita de la radioj!

MARY: Estas tiel.

ANNA: Do estas vere. Kaj tre grave, ĉu? Jus la spicisto eĉ ne volis transdoni siajn varojn kaj metis ĉion sur la plankon. Li diris, ke li ne volas rilati kun ni, ke la tuta domo estas infektita.

MARY: Sed tio estas babilaĵo, pri io tia eĉ ne estas parolo.

ANNA: Li diris, ke sinjoro James suferas la radiumo-mal-sanon, kaj ke ĉiu, kiu tuŝos lin, estos infektata.

MARY: Sinjoro James por neniu estas danĝera kaj vi povas trankvile tuŝi lin. Ne timu!

ANNA: Mi ne timas, por mi mem mi ne timas. Eĉ se James havus peston aŭ ĥoleron, mi mem flegus lin. Pri tio ne temas.

GEORGE (*eniras*): Ne sonoriginte, mi eniris la domon. La pordo ne estis fermita.

ANNA: Mi certe forgesis fermi ĝin post tiu aĉa spicisto kun siaj varoj.

MARY: Tiu viro rakontis al Anna, ke estas danĝere tuŝi James pro la radio-aktiveco.

GEORGE: Tiujn babilaĵojn vi ja ne kredas, ĉu, Anna?

ANNA: Estas al mi egale, ĉu tio estas vera aŭ malvera. Temas nur pri tio, ĉu tiu terura aĉaĵo povos kosti al sinjoro James la vivon.

MARY (*avertante George*): Anna diras, ke James klopodis elturniĝi kiam ŝi insistis pri klara respondo.

GEORGE: Sed tian demandon ja neniu povas respondi kun certeco!

ANNA: Ankaŭ vi klopodas elturniĝi!

GEORGE: Se vi tiel volas nomi la teniĝon de iu, kiu respondi ne povas, do faru tion. Nenion ni scias certe.

ANNA: Granda ĉielo: nenion ili scias certe! Kaj tamen oni senlime laboraĉas pri tiu danĝera fiaĵo! Dio mia, se estus vere, ke neniu scias... (*konsternite*) tiam... tiam neniu povus helpi lin! Kompatinda, kompatinda James! (*Ŝi foriras*).

MARY: Bonulino!

GEORGE: Sed kiom proksime al la vero ŝia nescio kondukis ŝin! Nia scienca rezervo estas por ŝi... aero! Kaj prave... Sed rakontu al mi iom pri James.

MARY: Ne parolu tiom laŭte! Li ripozas por kelkaj momentoj; li havas kapdoloron.

GEORGE: Kiel li fartas?

MARY: Mi ne scias, kion diri pri tio. Li ne estis tre parolema, kaj kondukis strange.

GEORGE: Kion li diris?

MARY: Pri tio ni ne parolis. Li ŝajne evitas tion kaj mi ne tuŝis la temon.

GEORGE: Kia estas lia animstato?

MARY: Mi ne scias. Oni ne povas konkludi kun certeco. Jen kvieta, jen malkvieta; eble iom ekscitita.

GEORGE: Kompreneble, se oni havas tian perspektivon!

MARY: Atentu! Ne parolu tiom laŭte, li povus aŭdi.

GEORGE: Li mem tro bone scias.

MARY: Sed li povus dubi. Absolutan certecon oni ne povas havi. Ja okazis iam, ke provbesto transvivis fortan radiumadon.

GEORGE: Sed por kiom da tempo kaj kiel?

MARY: Ankaŭ la medicina scienco progresis en la lasta tempo, kvankam ne multe. Kiel ajn estu, li ne rimarku, ke ni konsideras lin perdita.

GEORGE: Kompreneble; tio estus terura. Sed ne atendu, ke li eĉ iomete kredos nian optimismon.

MARY: Kaj kion vi atendas?

GEORGE: Same malmulte kiel vi. Sed ni povas permesi al ni, paroli malkaŝe; ni estas rigardantoj je distanco kaj ekster danĝero.

MARY: Tiam ni falos en alian ekstremon kaj anticipos la okazontaĵojn. Homoj kun estonteco. Antaŭ unu horo, kiam mi staris en butikoj por aĉeti florojn por James, mi ekkonsciis kun timo, ke mi jam aĉetis unu el la tombaj florkronoj pendantaj tie sur la muro. Ĉu ne abomeninde?

GEORGE: Same abomeninde, kiel kompreneble. Ĉu jam vizitis lin kuracisto?

MARY: Li ne iris al la hospitalo, sed mi kredas, ke lia patro promesis averti doktoron Clark. . . . Krom tio, George, min ĝenas io alia: mi havas malfacilaĵojn koncerne James, kaj ne scias kion fari. Eble vi povas konsili al mi.

GEORGE: Mi esperas.

MARY: Sed unu aferon vi promesu, nome, ke vi ne lasos rimarki ion al li. Tion mi trovas terura. Lin okupas io eksterordinara; li rigardas min strange, alie ol antaŭe, kvazaŭ li enamiĝis en min.

GEORGE: En tio li ne estas alia ol antaŭe. Tion ja ankaŭ vi sendube rimarkis?

MARY: Mi dubis, konjektis, sed neniam kredis.

GEORGE: Ĉu li aludis?

MARY: Li nenion diris; male, li estis silenta, kontraŭ sia kutimo. Li rigardis min kiel malgranda knabo, kiu serĉas helpon. Se mi kuraĝus, mi estus preninta lin en miajn brakojn.

GEORGE: Kiaĵ vi ne faris?

MARY: Ĉu vi ne komprenas?

GEORGE: Mi ĉiam pensis, ke ankaŭ al li vi sentas korinklinon.

MARY: Ĉu gravas en ĉi tiuj cirkonstancoj miaj sentoj?

Miaj sentoj estas flankafero. Nun temas nur pri li. Se li parolos, sin esprimos, kion mi do faru, kion mi respondu al li? Ĉu mi cedu, ĉu mi ligu lin per novaj ligloj al la vivo, kiun li devas forlasi, aŭ ĉu mi rifuzu lin, seniluziigu lin kaj tiel malbonigu liajn lastajn tagojn?

GEORGE: Vi pravas; tio ne estas facila elekto.

MARY: Ĝi estas terura!

GEORGE: Kaj kiu povus konsili?

MARY: Se li pensas, ke li resaniĝos, ke li tamen havas ŝancon sukcese trapasi. . . .

GEORGE: Tiam estus bone, cedi. Tio plifortigus lian esperon. Provu tiel!

MARY: Mi preskaŭ ne kuraĝas. Imagu, ke li travidas tion!

GEORGE: Por tio ne estas multe da ŝancoj, se li amas vin. Amo faras eĉ homon kun agla rigardo tiel blinda kiel talpo.

MARY: Mi hezitas. . . . Kaj mi? Ĉu vi povus ludi ludon, en kiu vi metis vin mem sur la karton?

GEORGE: Tian ludis James.

MARY: La kompatindulo! (*Si mallaŭte ploras*).

GEORGE: Nu, Mary, tenu vin kuraĝa. Tia li nepre ne vidu vin.

GEORGE: Atentu, mi aŭdis ion. Mi kredas. . . .

ANNA (*enirante dekstre*): Jen, la gazeto. Sinjoro James staras en ĝi, kaj la profesoro, kaj vi kaj ankaŭ vi. Rigardu. (*Si disfaldas la gazeton*).

GEORGE: Nu, nu, oni ne povas diri, ke la sinjoroj de la gazetaro timas iom da sensacio.

MARY: Kia titolo: „Juna scienculo sin oferas!”

ANNA: Ĉu tio estas vera?

GEORGE: Ĉiu vero estas relativa, precipe la vero en la gazetoj.

ANNA: Ĉiu mensogas. Kial do ne gazetoj? Ĉio estas trompo! (*Si foriras*).

GEORGE: Kaj sintrompo. Cetere ni kaŝu tiun gazeton, Mary. Povas esti granda honoro, legi sian kondamnon-al-morto sur la unua paĝo de la gazeto, sed tre ĝojiga tio ne ŝajnas al mi.

MARY: Ne, James absolute ne vidu tiun gazeton. Metu ĝin en vian poŝon.

GEORGE: Kompreneble li tamen ricevos ĝin en la manoj, sed ju pli malfrue, des pli bone.

Prof-o THOMSON kaj GREENWAY (*eniras dekstre*).

Prof-o THOMSON: Ha, vi ambaŭ ĉeestas. . . . Kie estas James?

GREENWAY: Bonan tagon, doktoro Holms, sinjoro Benner.

GEORGE: Bonan tagon, Ekscelenco.

MARY: James iom ripozas. Li estis tre laca.

Prof-o THOMSON: Bonvolu eksidi kaj momenton atendi; dume mi serĉos lin. (*Li foriras maldekstre*).

GREENWAY: Nu, tio okazis en la plej lasta momento, hodiaŭ matene! Ĉu vi ambaŭ deĵoris?

GEORGE: Jes, Ekscelenco, en la momento de la perturbo ni estis en la kontrolĉambro.

GREENWAY: Ĉu vi konjektas la kaŭzon de la perturbo?

GEORGE: Eĉ ne iomete.

MARY: Nek mi.

GREENWAY: Tio, kion la juna Thomson faris, estas senkompara. Efektive, mi scias nur unu vorton por tio: senkompara!

Prof-o THOMSON kaj JAMES (*eniras maldekstre*).

GREENWAY (*ekstaras*): Ha, sinjoro Thomson!

JAMES: Ekscelenco! (*Li donas manon*). George!

GEORGE: James, mian dankon, amiko! Kvankam mi venis iom malfrue...

JAMES: Ĉesu, ĉesu....

GREENWAY: Kaj ankaŭ mi, sinjoro Thomson, ankaŭ mi venis iom malfrue, verdire iom tro malfrue por danki la viron, kiu savis nin ĉiujn. Sed mi estis retenita, ĉar la fabrikoj gvidantoj devis kunveni tuj post kiam la laboro estis daŭrigata. Oni elektis deligitaron el la dungitoj, kiu poste dankos vin en la nomo de ĉiuj. Tamen mi ne volis preterlasi la okazon antaŭe persone premi al vi la manon.

JAMES: Mi dankas vin.

GREENWAY: Ne danku, ne danku. Mi estas via ŝuldanto, ni ĉiuj, ne nur tiuj kiuj estas laborantaj en la fabriko kaj loĝas en la ĉirkaŭaĵo, sed nia tuta popolo.

JAMES: Kaj ĉu mi devas trankvile toleri ĉiujn ĉi dankesprimojn? En kritika momento oni faras tion, kio estas

necesa. Oni nur rezignacias aktive anstataŭ pasive en la neeviteblo. Jes, kaj tio estis fakte ĉio. Cetere ne ekzistis elekto.

GREENWAY: Ekzistis la eblo *ne* fari tion! Se ne *vi* estus aginta. . . .

JAMES: Tiam Benner estus interveninta.

GEORGE: Vi evidente havas pli da fido pri mia kuraĝo ol mi men. Mi staris kvazaŭ paralizita.

JAMES: Kuraĝo ne havas multon komunan kun tio. Mi neniam estis heroo. Subite montriĝas, ke oni agas, ke oni faras ion, ke oni estas devigata.

GREENWAY: Kiel ajn estu — vi faris tion, kaj krom homojn vi savis ankaŭ unu el niaj plej gravaj ŝtataj entreprenoj.

JAMES (*malagrabla tuŝita*): Oĥ vere, pri tio mi tute ne pensis: la fabrikoj. . . . La fabrikado estas daŭrigata. . . .

GREENWAY: Dank' al vi!

JAMES: Mirige, jes, dank' al mi, ĝuste per mi!

GEORGE: Jen, vi do vidas. . . .

JAMES: Ke oni, kiel ŝajnas, ne povas eskapi.

GEORGE: Evidente.

JAMES: Juĝante post la faktoj, mi devas konfesi, ke, se tio estus vera, estus pli bone, se mi nenion estus farinta, se multege. . . .

Prof-o THOMSON (*intence interrompante lin*): Multege da gratuloj, leteroj, telegramoj, floroj venis. . . .

JAMES: Multe tro multe. En la milito sennombraj viroj alportis pli grandan oferon.

GREENWAY: Tio pli ofte estis alia. Vi povas scii tion, ĉar vi mem servis en la armeo. Nepre ne ĉiuj kiuj falis, estis herooj kaj, laŭ viaj vortoj, aktive partoprenis.

JAMES: Aktive partoprenis? Oĥ ne, tio estas afero de devo, oni estas devigata, oni ne povas agi alie.

GREENWAY: Afero de *sankta* devo!

JAMES: De simpla, senracia devo, Ekscelenco!

GREENWAY: Senracia?

JAMES: Generalo, al kiom da homoj laŭ via opinio, mi savis la vivon?

GREENWAY: Al kiom da? Eĉ la proksimumo estas mal-facile direbla. Almenaŭ tridek mil, eble eĉ sesdek mil.

JAMES: Kaj kiom da centmiloj aŭ milionoj trovos la morton per la atombomboj, kiujn oni faros en la de mi savitaj fabrikoj?

GREENWAY: Rimarkinda konstruĉio! La fabrikado de atombomboj estas arango kun antaŭgarda karaktero.

JAMES: Tiu motivo ne estas nova: si vis pacem, para bellum....

GREENWAY: Tiel estas ankoraŭ nun. (*Donante al la interparolo alian direkton*): Kaj.... e.... sinjoro Thomson, se mi povos komplezi al vi per io ajn, mi volonte faros al vi ian servon. Ĉu vi ankoraŭ havas dezirojn?

JAMES: Apenaŭ.... Eble tamen: nek paroladojn, nek florojn ĉe mia enterigo.

GREENWAY: Sed kial pensi pri io tia?

JAMES: Mi.... e.... mi faras nur antaŭgardajn arangojn.

Kaj, jes, (*li rigardas, antaŭ ol daŭrigi, al sia patro*), jes, mi havas ankoraŭ alian deziron, tre specialan, aŭ verdire seriozan kaj insistan peton.

GREENWAY: Nu?

JAMES: La Piradiumo en sia nuna stato estas malstabila; ĝi ankoraŭ ne taŭgas por la celoj, al kiuj vi volas apliki ĝin.

GREENWAY: Post kelka tempo oni sendube faros ĝin uzebla por ili.

JAMES: Mi dezirus, ke al mia patro vi ne tro insistu, ke vi ne devigu lin, antaŭtempe transdoni la....

GREENWAY: Ni havas tempon ĝis la dudeka de la sek-vonta monato. La raporto estas aparta afero, sed la esplorado estos daŭrigata, ĉu ne, profesoro?

Prof-o THOMSON: Ni faros ĉion eblan....

JAMES: Ĉion eblan por kaŭzi al la homaro senkomparan

katastrofon. Ni estu singardaj, Ekscelenco, kaj prokrastu la aplikon de la Piradiumo, ĝis kiam la homoj estos lernintaj prudente uzi la al ili donitan povon.

GREENWAY: Ĉu la Piradiumo estos prudente aŭ neprudente uzata, estas demando, kiun respondi ne estas nia tasko. Mi opinias, ke ni povas sentime lasi tion al la registara komisiono. Nia tasko estas nur, zorgi ke la laboro pretiĝu.

JAMES: La laboro de l' detruado.

GREENWAY: Vi estas stranga, aparta homo, sinjoro Thomson.

JAMES: La situacio, en kiu mi troviĝas, havas tre apartan karakteron. Dum mi ankoraŭ staras antaŭ vi, mia voĉo jam venas de tie, kien mia spirito ĉiumomente forvagas: la alia mondo. Konsideru mian peton do kiel averton, generalo, kiel averton de la alia mondo.

GREENWAY: Vi ŝajnas al mi laca; iom ekscitita. Ne estus malbone, se vi ripozus iom da tempo.

JAMES: Tiu ripozo venos, baldaŭ....

GREENWAY (*donante manon*): Adiaŭ, sinjoro Thomson. Kaj refoje dankon!

JAMES: Ekscelenco!

GREENWAY kaj Prof-o THOMSON (*foriras dekstre*).

MARY: Kiel vi kuraĝis!

JAMES: Kion?

MARY: Al Greenway!

JAMES: Mi staras sub komando de estro pli potenca ol Greenway! Nu jes.... absurdaĵoj.... nur absurdaĵoj. (*Li oscedas*). Pardonu.

MARY: Kiel vi nun sentas vin?

JAMES: Mi agis bone, sekvante vian konsilon iom ripozi. Mi multe refreŝiĝis.

MARY: Ĉu vere?

JAMES: Mi sentas min kvazaŭ renaskiĝinta.... (*Li ridas abrupte*). Renaskiĝinta.... ne malbona komparo. La Fe-

nikso releviĝinta el elektrona bombardado! Moderna mitologio, ĉu ne, George?

GEORGE: Kiu scias!

JAMES: Ni scias, George, ankaŭ vi. (*Oni frapas*). Eniru! D-ro CLARK (*eniras dekstre*): Bonan tagon!

JAMES (*iom ironie*): Ha, nia doktoro Clark, mia anĝelo de savo!

D-ro CLARK: Ne tuj direktu al mi plenan salvon da ironio, Thomson!

JAMES: Vi pravas, vi ne meritas tion, ankoraŭ ne meritas. Sed mi avertas vin, ne komencu, rakontante fabelojn!

D-ro CLARK: Tiu ideo ne venis en mian kapon. Mi estas tie ĉi, ĉar via patro petis min veni. Sincerdire: mi atendis, ke vi jam pli frue vizitos min en la hospitalo.

JAMES: Tro frue, mia kara. Tiom longe, kiam mi ankoraŭ povos movi la piedojn, tio ne okazos.

D-ro CLARK: Kial vi tiom longe, eble tro longe, atendu?

JAMES: Ne faru abomenindan ŝercon, mia kara Clark. Mi vidis ĉiujn marmotojn, hundojn kaj kuniklojn, kiujn vi per niaj G a m m a-radioj sendis al la alia mondo.

D-ro CLARK: Tio ne estas taŭga mezurilo!

JAMES: Jen, tion vi ankoraŭ ne spertis: provbeston, kiu parolas kaj posedas propran opinion! Sed mallonge: ĉi momente mia sanstato ankoraŭ ne estas tia, ke mi devas transdoni min al via hospitalo.

D-ro CLARK: Tio tute ne estas mia deziro kaj mi ankaŭ ne intencas veni al vi kun fabeloj. Ni ne bezonas klopodi kredigi ion unu al la alia. Ni ja ankoraŭ ne havas multe da klinika sperto sur ĉi tiu tereno kaj nia tuta terapio estas ankoraŭ en vandoj.

JAMES: Se ĉi tiu respondo ne estas prudenta, ĝi almenaŭ estas modesta.

D-ro CLARK: Kaj tamen mi volas konsili al vi, ne tro multe cedi al via prudenta pesimismo.

JAMES: Ni ne malŝparu vortojn pri ĉi tiu afero, Clark. Mi

promesas ke mi turnos min al vi, kiam mia sanstato estos tia, ke mi ne plu povos zorgi pri mi mem.

D-ro CLARK: Tio estas unu flanko de la afero, la persona, kiom ĝi koncernas vin mem.

JAMES: Mi ne sciis, ke mia afero havas ankoraŭ nepersonan flankon. Tio estus tute nova vidpunkto.

D-ro CLARK: Eble.

JAMES: Ĉu mi konfidu min al via kuracado — ne, kuracado estas troigo, mi diru, ĉu mi konfidu min al via observado, pro tio, ĉar en mia. . . . okazo ankaŭ aliaj interesoj postulas atenton?

D-ro CLARK: Ne forgesu, ke mi ĵus konsentis, ke sur ĉi tiu kampo ni havas tre malmulte da sperto, ke pri la irado de la proceso ĉe iu, kiu estas trafita de Gamma-radioj, ni. . . .

JAMES: (*ridas komprene*): Kompreneble! Kiel mi povis esti tia azeno, ke mi ne tuj komprenis tion! Sed parte ankaŭ vi kulpas pri tio, Clark; vi estas tro singarda, vi tro volis indulgi min. Parolu malkaŝe, dirante, ke vi deziras, ke mi estu en via proksimo, por ke vi povu kontroli min, por ke vi povu observi de horo al horo, kiel la detrua proceso iras. Sen sperto ankaŭ la medicino ne povas progresi.

D-ro CLARK: Vi nun rigardas tion tro unuflanke.

JAMES: Ĉesu paroli. Vi povas kalkuli pri mi. Kial mi ne farus al vi tiun malgrandan servon? Mi ĝin faros; mi estas preta ĉiel kunlabori, sed kun unu kondiĉo: ke oni kiel eble plej longe ne okupu sin pri mi, kaj ke mi do ne lasos sendi min al la hospitalo, antaŭ ol mia sanstato nepre postulos tion. Ĉu interkonsentite?

D-ro CLARK: Interkonsentite.

JAMES: Ĉu vi komprenas la celon, George?

GEORGE: Certe.

JAMES: Ĉu ankaŭ vi, Mary?

MARY (*post momenta hezito*): Jes.

JAMES: Ĉe tio vi ja ne bezonas tiom malgaje rigardi? Estas privilegio, povi fari tion. Ĉiu ja devas iam morti. Sed kiom malmultaj mortas signifoplene kaj povas per sia morto kontribui iom al la vivo! Mi helpos vin, Clark, tion mi promesas. Vi povas konfidi tion al mi; mi scias la valoron de ekzakta observado. Mi akre kontrolas min; mi notos miajn rimarkojn de horo al horo, de tago al tago. Vian parton de la laboro vi povos trankvile plenumi; mi estas al via dispono. Vi povas veni ĉi tien por esplori min, por depreni sangan kaj fari ĉion, kion vi krome opinias necesa. Sed ne en la hospitalo. Mi havas ankoraŭ aliajn aferojn por fari, kaj deziras kiel eble plej longe resti mastro de mi mem kaj de mia tempo. Ĉu interkonsentite?

D-ro CLARK: Bone. (*Li ekstaras*).

JAMES: Bonvolu transdoni miajn salutojn al Burnham.
(*Li kondukas lin al la pordo; ambaŭ foriras dekstre*).

MARY: Kiel vi opinias pri tiu teniĝo?

GEORGE: Ĝi estas James, la malnova James.

MARY: Ĝi estas preskaŭ superhoma.

JAMES (*eniras dekstre*): Kial tiu viro ne tuj diris, kion li deziras, ĉu? Kvazaŭ li devis peti donacon por si mem.... Kaj nun ni fine estas inter ni.... Estas bone, ke vi ambaŭ ĉeestas, nia grupo, la malnova kunlaborantaro; kun la ceteraj ni ne havas ion komunan. Kiel vi opinias pri mia propono: kune manĝi hodiaŭ vespere?

GEORGE: Se vi trovas tion agrabla....

MARY: Kaj ne estas tro laca....

JAMES: Mi sentas min bonege, jes, ankoraŭ mi sentas min bonege. Hodiaŭ ni profitu la okazon. Ĉi tiu tago ankoraŭ apartenas al ni, sed poste, morgaŭ, komenciĝos mia tasko: tiam mi ĉiun horon devos observi, kiel mi sentos min.... La provbesto observata de si mem! Mi ĉion ekzakte kontrolas: temperaturon.... spiradon, funkcion de la sentumoj.... pulson.... (*li palpas al si la pulson*), mi senemocie kontrolas, kvazaŭ tio ne koncer-

nas min mem. Pulso (*li kalkulas*): unu... du... tri... kvar... kvin... (*Li teruriĝas kun rigardo al sia poŝhorloĝo*). Granda ĉielo! Tio... Mia horloĝo!

GEORGE: Kio estas?

JAMES: Mia horloĝo haltis je kvarono post la naŭa, en la momento, en kiu mi hodiaŭ matene enpemis la platojn de la pilo, en la momento de la katastrofo... Sed tio ja ne eblas!

GEORGE: Komprenoble. Sur la metalojn de horloĝo G a m m a-radioj ne havas influon. (*Rigardante la horloĝon de James*): Sed vi misrigardis, via horloĝo montras kvaronon antaŭ la tria!

JAMES (*emociite*): Ĝi... haltis je kvarono post la naŭa!

GEORGE: Vere ne; rigardu pli bone! Ĝi ankaŭ ne haltis.

JAMES: Ĉu ĝi iras?

MARY: Rigardu do la sekundo-montrilon!

GEORGE: Ĝi estas brava, belega horloĝo kaj montras eĉ minutprecize la ĝustan tempon.

JAMES: Kiel eblas, ke mi tiel misrigardis, ke mi ripete eraras? Tio, pro Dio, pruvas perdon de sinkontrolo... Mary, George... kaŭzas tion la angoro, kiu estas pli forta ol mi. Mia Dio, Mary (*Li kaptas ŝin, serĉante ŝirmon; emociite*): Mi timas, TIMAS!

(KURTENO)

PAŬZO

TRIA AKTO.

Loko de agado: malsanula ĉambro en hospitalo. La fono konsistas el egale helgriza aŭ kremkolora ŝtofo. En la mezo de la ĉambro, kun la kapa parto ĉe la muro, staras lito; dekstre kaj maldekstre de ĝi staras seĝo, dekstre ankaŭ lita ŝranketo. Kelkajn metrojn for de la lito, dekstre, staras blanke lakita tablo kun telefono. Apud la tablo — seĝo. Sur la muro super la lito pendas granda folio da papero kun grafikaĵo, kies linioj preskaŭ ne estas videblaj de el la teatra salono. Enirejo al la sceno troviĝas dekstre kaj maldekstre inter la kulisoj.

Estas posttagmezo. Kiam la kurteno leviĝas, profesoro Thomson sidas, enprofundiĝinta en pensoj, sur la seĝo ĉe la blanka tablo. Post kelkaj sekundoj doktoro Clark en blanka surtuto eniras maldekstre.

D-ro CLARK: Bonon tagon, profesoro.

Prof-o THOMSON: Doktoro Clark!

D-ro CLARK: Momenton. Nian pacienton oni tuj enkondukos.

Prof-o THOMSON: Ĉu io eksterordinara?

D-ro CLARK: Malmultaj ŝanĝiĝoj, almenaŭ ekstere, krom sur la haŭto.

Prof-o THOMSON: La ordinara fatala proceso.

D-ro CLARK: Nur la vidkapablo forte malpliigis en la lastaj tagoj.

Prof-o THOMSON: Kaj kiel li portas tion? Kiel li sentas sin?

D-ro CLARK: Rimarkinde multe pli bone. Ŝajnas, ke aperis iom da eŭforio.

Prof-o THOMSON: Ĉu stato de sensenteco?

D-ro CLARK: Ankaŭ tio, sed nur korpe. Lia intelekto estas neskuita kaj la klareco de lia spirito estas miriga.

Prof-o THOMSON: Sed ĉu li estas trankvila?

D-ro CLARK: Ho jes, li eĉ faras impreson de kontento, kvankam pri tio estas malfacile juĝi kun certeco. Li helpas nin kiom li povas; la plej rimarkinda paciento, kiun mi iam renkontis. Li observas sin kun miriga objektiveco, senemocie kaj afere, kvazaŭ tio ne koncernas lin mem. Ankaŭ la grafikaĵo super la lito estas lia verko. La tuta irado de la malsano kun ĉiuj simptomoj kaj ceteraĵoj estas notitaj sur ĝi. Kiom liaj okuloj ankoraŭ permesas tion, li ĉiutage daŭrigas la liniojn. Komprenoble ankaŭ ni mem faras notojn pri lia stato, sed ni lasas al li la iluzion...

Prof-o THOMSON: Kompatinda knabo!

D-ro CLARK: Sed kun admirinda spiritoforto!

Prof-o THOMSON: Tian spiritoforton li posedis jam kiel infano kaj kiom ofte ĝi estis la motoro de nia laboro, precipe kiam la aferoj malprosperis! Nun ankaŭ li iĝis viktimo de la radioj same kiel multaj aliaj esploristoj antaŭ li. Sed al mia filo tio venis efektive tro frue. Estus pli bone, se tio estus trafinta min.

D-ro CLARK: Jen, ili venas, profesoro.

(De dekstre James estas alveturigata per malsanula rad-seĝo. Li estas pala kaj kadukiĝinta kaj faras impreson esti tre laca. Tiu ĉi stato de apatio daŭras la tutan akton, esceptokaze en kelkaj scenoj, en kiuj lia antaŭa vivoforto elrompiĝas. Li kaŝas la gravan malpliigon de sia vidkapablo kaj do ne parolas pri tio, sed el lia ludo montriĝas, ke li ne plu povas bone vidi).

Prof-o THOMSON: James!

JAMES: Ha, jen mia patro! Ĉu vi atendis longe?

Prof-o THOMSON: Ne, nur kelkajn minutojn!

JAMES: Ĵus ni kune esploris la provbeston, ĉu ne vere, doktoro Clark?

D-ro CLARK: Jes, vi moku nin! Sed nun mi devas vin forlasi! *(Etendante manon)*: Adiaŭ, profesoro!

Prof-o THOMSON: Adiaŭ, doktoro Clark!

D-ro CLARK (*foriras dekstre*).

JAMES: Bonega homo kaj ne stulta. Sed por la kuracado mi ankaŭ povus esti turninta min al ĉiu ajn alia, kiu portas blankan surtuton: al frizisto aŭ al laboratoriano.

Prof-o THOMSON: Ili faras, kion ili povas.

JAMES: La sola, kio ĉi okaze estas en ilia povo, estas kaŝi sian nepovon. Mi krome ne estas facila paciento por ili. Kelkfoje ŝajnas, ke ni hontas unu antaŭ la alia; tiam ni serĉas konsolon ĉe la scienco, agas kvazaŭ mi estas instrua okazo, kvazaŭ nia komedio havas ian utilon.

Prof-o THOMSON: Kiu scias!

JAMES: Ni scias. . . . Sed nun pri io alia, Patro: kiel marŝas la aferoj en la laboratorio? Ĉu vi jam havas novan asistanton?

Prof-o THOMSON: Ne, via loko ankoraŭ ne estas okupita. Ni ĉiuj pli multe streĉas niajn fortojn, precipe Mary kaj George.

JAMES: Jes, ili fervore laboras, kaj ankaŭ vi. Via voĉo sonas lace.

Prof-o THOMSON: La lastajn noktojn mi dormis malbone.

JAMES: Ĉu vi havas zorgojn? Pri la finraporto?

Prof-o THOMSON: La finraporto estas preta; mi kunprenis ĝin en mia teko.

JAMES: Jes, jes, mi memoras: hodiaŭ estas la dudeka; la komisiono kunvenos. Pro tio vi kunprenis la raporton. Akurata. . . . kiel ĉiam!

Prof-o THOMSON: Ne povis esti alie, mia knabo, kreu min. Ne supozu, ke mi ne pripensis, kion vi diris al mi. Vere, mi vaste konsideris viajn skrupulojn. Mia sendormeco do havis kaŭzon, kaj kvankam mi, malgraŭ tio, vizitos la kunvenon, mi tamen faras tiun paŝon ne senpripense. Ĉu vi kredas tion?

JAMES (*apatie*): Certe.

Prof-o THOMSON: Kiam oni iĝis pli aĝa oni komencas pensi pri tiuj aferoj alie, James. Tion vi mem spertos.

JAMES: Mi nenion spertos.

Prof-o THOMSON (*iĝante pli kaj pli pozitiva, klopodas konvinki lin*): Mi volas diri, ke argumentoj, kiuj estas nerefuteblaj kiam ni estas junaj, poste montriĝos ne plu trafaj. Kiam ni atingis difinitan aĝon, tiam kuŝas post ni io, al kio ni povas fiere rigardi returne: plenumita peco da vivotasko. Tiam ni komprenas, ke ni pene kaj zorge plenumis ion, kion ni ne rajtas senkonsidere forĵeti. Ĉu vi povas sekvi tiun penson?

JAMES: Oĥ, jes.

Prof-o THOMSON: Tiam ni juĝas malpli unuflanke, ĉar ni lernis, ke ĉiu afero havas ne nur unu aŭ du, sed sennombrajn flankojn. Vi ja ne povas ne konsenti, ke mi, konsiderante, ĉu mi rifuzu mian pluan kunlaboron, havis la rajton demandi min, kial mi faru tion kaj kio estos la sekvo. Kaj kio estis la kaŭzo? Fiksa ideo, spekulacio pri la estonteco, pesimisma atendo, kiu cetere povus montriĝi tute alia. Post pli ol tridek jaroj da malfacila laborado oni ne havas rajton kondukti kiel Don Kiĥoto, ĉu ne vere?

JAMES (*silentas*).

Prof-o THOMSON: Kaj koste de kio? Preterlaso de devo, rompo de promeso, perdo de honoro, pereco de ĉio, kion oni konstruis. Tio estas aferoj, kiuj multe, tre multe pezas, mia knabo. Kaj pri malfideleco, pri sendankeco al tiuj, kiuj ebligis al mi labori, mi eĉ ne parolu. Ĉu vi komprenas tion? . . . Vi kapjesas, sed prefere respondu! Ĉu vi konsentas aŭ ne konsentas? . . . Kial vi ne respondas?

JAMES (*apatie*): Daŭrigu.

Prof-o THOMSON: Ne pensu, ke miaj argumentoj estas elĉerpitaj. Mi havas ankoraŭ pli, multe pli da ili. La samaj kialoj, kiuj igas iujn supozi, ke la atomenergio estos katastrofo por la homaro, povas igi aliajn diri, ke ĉi tiu forto finfine estos beno por ĝi. Ĉiu teĥnika evolucio ja estas akompanata de socia krizo.

JAMES: Ĉu vere?

Prof-o THOMSON: Ĉiuokaze estas vere, ke al ĉiu scienco aŭ teĥnika novaĵo neniam mankis malgajigaj antaŭdiroj. La malkovro de la pulvo estis same kiel nun, kaŭzo por antaŭdiri la pereon de la mondo; la enkonduko de la vapormaŝino kaŭzis maltrankvilon kaj timon; la maŝina teksilo ribelojn; la elektro.... Tiel mi povus daŭrigi. Ĉu ne vere?

JAMES: Certe.

Prof-o THOMSON: Vi do konsentas. Ili cetere estas veroj, historiaj faktoj, kiujn oni povas trovi en ĉiu libro pri historio. Tion vi ja konsentas?

JAMES: Kial mi neus?

Prof-o THOMSON: Vi diras tion kun tono, kvazaŭ tio ne koncernas vin, kvazaŭ vi min.... James, knabo, ne forgesu, ke ankaŭ por opinio, pri kiu ni ne konsentas, ni tamen povas havi respekton, ĉu ne? Ni ja devas kuraĝe akcepti la konsekvencojn de tio, kion ni faras; ne timi iom da risko kaj klopodi por rigardi pli malproksimen. Ĉi tion mi trankvile pripensis, James. Mi intence venis antaŭ la kunveno ĉi tien por diri tion al vi, por klarigi al vi, ke mi agas tiel ne pro nedecidemo aŭ pro manko de kuraĝo. Mi esperas, ke malgraŭ la malsameco de niaj opinioj, vi povas aprezi tion.... Nu, James?

JAMES: Mi ne plu havas ion dirindan, Patro.

Prof-o THOMSON: Ĉu vi do komprenas....

JAMES: Ne, Patro. Sed vi iru. Estas bone.

Prof-o THOMSON: Ĉu vi seriozas?

JAMES: Via konduto estas same bona, kiel tiu de la viro, kiu al infanoj volis doni cianon kiel ludilon. Kaj nia Piradumo estas eĉ multe pli danĝera ol ciano, kaj la homoj, kiuj atendas vin, cetere ne estas infanoj, al kiuj oni povas, se necese, malpermesi ion.

Prof-o THOMSON: Sed aŭskultu do....

JAMES: Ne, vi nun iru, Patro.

Prof-o THOMSON: Vi do ne kredas min.... (*Li restas sta-*

ranta kun etendita mano).

JAMES: Iru, oni atendas vin. . . . (*Li ne donas manon*).

Prof-o THOMSON: Do ne. . . . ne komprenis. . . . James. . . .

JAMES: Adiaŭ, Patro.

Prof-o THOMSON: Adiaŭ, mia knabo. . . . (*Li foriras malvigle*).

MARY (*enirante dekstre*): Bonan tagon, profesoro!

Prof-o THOMSON (*rigardas momenton post si kaj tiam foriras*).

MARY: James!

JAMES: Bonan tagon, Mary.

MARY: Pli frue ol vi supozis, ĉu?

JAMES: Mi ĝojas, ke vi venis.

MARY: Mi volis veni eĉ pli frue, sed mi ne havis okazon foriri.

JAMES: Mi scias: vi ĉiuj estas tre okupitaj pro mia porcio, kiun vi ricevis aldone.

MARY: Via patro ne volas, ke iu anstataŭu vin, kaj George kaj mi samopinias.

JAMES: Oni trankvile okupu mian lokon. Mi ja ne revenos, ankaŭ ne, se. . . . Mary, ĉu vi poste tre sentos mian foreston?

MARY: Vian foreston ni sentas jam nun.

JAMES: Sed poste?

MARY: Ne diru tion ĉiufoje!

JAMES: Kial ne? Lasu min paroli. Vi ne scias, kiom signifas por mi, ke mi fine kuraĝas paroli malkaŝe. Estis unu el miaj eraroj, ke mi ĉiam parolis tro malmulte. Oni ne atendu, esti komprenata sen vortoj. Ankaŭ ni nun devas fine interparoli. . . . eta Mary!

MARY (*kvazaŭ gaje*): Bone! Do komencu!

JAMES: Temas pri ni ambaŭ, Mary, pri vi kaj mi. Dum via vizito la posttagmezon post la katastrofo, mi ekkuŝis por iom ripozi. Ĉu vi rememoras?

MARY: Jes.

JAMES: Iom poste venis George kaj tiam vi ambaŭ interparolis.

MARY: Jes, estas eble.

JAMES: Kaj el tiu interparolo, Mary, mia orelo kaptis kelkajn frazojn. Vi diris al George, ke vi estas en dubo. Ĉu vi rememoras tion?

MARY: Jes, iom.

JAMES: Ĉu vi rememoras, ke vi demandis vin, ĉu vi rajtas ligi min per novaj ligiloj al la vivo, kiun mi devas forlasi?

MARY: Kaj vi trovis tion absurda ideo?

JAMES: Ne absurda, Mary; tiu dubo ekzistis ankaŭ en mi. Mi scias, ke mi serĉis tiujn ligilojn, sed ne kuraĝis, kaj ankoraŭ nun mi serĉas ilin.

MARY: Mi bedaŭras, ke mi....

JAMES: Mi dankas al vi, Mary, ĉar la dubo, kiun vi tiam esprimis, nun donas al mi forton por diri al vi, Mary, ke....

MARY (*mallaŭte plorante*): James!

JAMES: Ke mi amas vin. Vi.... vi do komprenis?

MARY: Mi ne estus virino, se mi ne scius tion.

JAMES: Mary, kisu min!

(*Ili kisas unu la alian*).

MARY: Karulo!

JAMES: Kaj ĉi tion, Mary, ĉi tion vi timis?

MARY: Ne ĉi tion.

JAMES: Cio cetera estas flankafero, aŭ eble ne, ne por vi, ĉar vi devas vivi plue. Pro tio mi devus silenti.

MARY: Ne, vi parolu!

JAMES: Vi estas bona, mi estas egoista. Vi faras ĉion pro mi, sed mi preterlasas nenion pro vi. Ĉu estas vere, Mary, ke vi faras tion nur pro mi, ĉar vi ne volas maldolĉigi miajn lastajn horojn?

MARY: Ne, James, absolute ne; ne pensu, ke mi ludas. Se vi aŭdis nian interparolon, vi do scias ankaŭ, ke tion,

ĝuste tion, mi ne povas fari.

JAMES: Do ne estas ludo, en kiu... en kiu vi metis vin mem sur la karton?

MARY: Kompreneble ne, malsaĝa knabo!

JAMES: Donu vian manon. Dankon. (*Paŭzo*). Ne, nun ne ploru! Klopodu ĝoji, ke niaj kisoj ne havos konsekvencojn, ne havos sekvojn kiel gefianĉiĝon, geedziĝon, tediĝon. Amo sen estonteco kaj apenaŭ havanta daŭron! Ĝi havas la eternecon de la neniam revenanta momento. Poste, kiam vi denove estos sola....

MARY: Mi promesas, James, mi diras al vi....

JAMES: Ne, ne, nenion diru, nenion promesu! Promesoj kreas devojn por la estonteco, sed por ni, por tio, kio ekzistas inter ni, estonteco ne ekzistas.

MARY: Eble tamen.... Ankaŭ la medicina scienco ne haltis.

JAMES: Vi ne bezonas doni al mi esperon, nek konsoli min. Estante kun vi, mi estas sen deziroj kaj sen sopiroj. Memoru tion, Mary, por ke vi, se necese, poste povu ripeti: mi estas la plej feliĉa homo sur la mondo. Neniam forgesu: la plej feliĉa homo!

MARY: Jes, James.

JAMES: Ne ĉagreniĝu, Mary. Rigardu al mi en la okulojn, por ke vi povu vidi, ke mi ĝojas; ke mi diras la veron kaj konscias pri tio, kion mi diras. (*Ekstaze*): Ĉion, kion homo povas deziri, mi posedas, ĉion en la plej pura, plej perfekta formo. Mi havas vin, vian amon, kiun mi neniam bezonos seniluziigi. Se mi donas promeson pri fideleco, vi scias, ke mi estos kapabla plenumi ĝin. Mi finis difinitan taskon, kiun mi povas transvidi kaj pri kiu mi povas esti kontenta. Kaj fine: mi krome helpas per mia morto la sciencon, kaj ankaŭ mia mortado estas tasko, kiun mi devas bone plenumi. Tio estas grava, tre grava, Mary.

MARY: Jes, James.

JAMES: Sed pli ol ĉio ĉi signifas por mi nia amo. Nia amo, kiu ne povas velki, kiu neniam ĉesos, neniam forpasos. Neniam forgesu, Mary; diru post mi: Nia amo, kiu ne pasos.

MARY: Nia... nia amo (*Si eksplodas en larmojn*).

JAMES: Ne ploru... Kial plori?

MARY: Mi ne scias.

JAMES: Sed mi scias. Ĉio okazis pro mia kulpo; mi estas ekzaltita frenezulo, kiu postulas neeblaĵojn.

MARY: Aĥ ne, knabo, trankvile daŭrigu!

JAMES: Ne, tio ne eblas; ĉi tio estas por vi turmento. Egoisto mi estas, freneza fantaziulo, kiu al vi kaj al si mem klopodas kredigi ion... (*Konsternite*): Vi estas prava, vi ne povas diri tion, ĉar ne estas vere. Ni ne estas privilegiitaj, nek vi, nek mi. Ĉio estas sintrompo, elturniĝoj de malfortulo. Kaj al vi, kompatindulino, kion mi faris!

MARY: Mi komprenas. Nu, tenu mian manon.

JAMES: Mi hontas pro ĉi tiu mizera arlekena ludo... Mi savis homojn? Sensencaĵo! Mi konservis ĉi tiun bombofabrikon! Ĉu tasko — tiu ĉi fino? Mensogo! Kaj vi, sendefenda, kompatinda viktimo! Vi — feliĉa? Ĉio estas falsa, nur malplenaj vortoj, post kiuj mi kaŝas mian timon, mian deziron vivi... Jen la vero, Mary: mi ne povas, ne volas morti; mi ne volas forlasi vin. Mi volas vivi, spiri; mi volas kisi vin, nun kaj morgaŭ kaj ĉiam... Sed morgaŭ, granda ĉielo, Mary, ne ekzistas morgaŭo, ne por mi...

MARY: Mia kara James (*Si ĉirkaŭbrakas lin; ambaŭ ploras*).

JAMES (*pli trankvile*): Dankon, tiel estas bone; jam pasis.

MARY: Estas pli bone, ke vi ne parolu.

JAMES: Kompatinda, brava knabino. Kion mi faris al vi!

MARY: Mi komprenas; vi ne bezonas senkulpigi vin.

JAMES: Mi ne povis malhelpi tion; tio alia estis dum mo-

mento pli forta ol mi. Mi ne havas senkulpigon, aŭ eble nur jenan: ke mi estas juna kaj amas vin.

MARY: Trinku iom (*Ŝi donas al li glason da akvo*).

JAMES: Dankon.... Strange, ĉu ne, ke homo tiom malmulte povas fidi sin mem.... Nu....

Prof-o THOMSON (*enirante dekstre*): James!

JAMES: Patro, vi revenis?

Prof-o THOMSON: Jes.... mi ŝanĝis mian decidon kaj revenis.... ĉar.... la homo tiom malmulte povas fidi sin mem.

JAMES: Ĉu vi do ne iris al la kunveno?

Prof-fo THOMSON: Mi telefonis al George, ke li anstataŭu min, por diri ke mi ne povas doni la raporton, ankoraŭ ne povas doni.

JAMES: Ĉu vi parolas serioze?

Prof-o THOMSON: En ĉi tiu momento la sinjoroj jam estas informitaj pri mia decido.

JAMES: Do tamen. Vi do rifuzas?

Prof-o THOMSON: Al definitiva rifuzo mi ankoraŭ ne venis; por tio mi estas tro malcerta pri mi mem. Sed mi povas pravigi min, dirante, ke mi ankoraŭ ne povas transdoni la Piradiumon por la fabrikado de bomboj, ĉar la stabileco ankoraŭ ne....

MARY: Sed, profesoro, ja estas tiel! Eĉ la lasta esploro estis koncerne ĉi tiun punkton plene malkontentiga!

JAMES: Sed tion Greenway ne unualoke deziras. Li volas antaŭ ĉio transdoni la plenan raporton, la sekreton de la fabrikado, al la registaro. La cetero estas afero de posta zorgo. La ministro sendube ne kontentiĝos pri via ago.

Prof-o THOMSON: Verŝajne ne.

JAMES: Kaj poste?

Prof-o THOMSON: Nu, kio poste? Ĉu ni scias en ĉi tiu minuto, kion ni faros en la sekvonta?

JAMES: Tiam vi devas aŭ iri returne aŭ fari pluan paŝon.

Prof-o THOMSON: Ĉiuokaze mi nun havas prokraston,

mallongan paŭzon por ekspiri. Ne estas multe, sed se vi scius, kiom multe nur ĉi tiu decido kostis al mi....

JAMES: Tion mi komprenas.

Prof-o THOMSON: Ĉu vere? Ĉu iu, kiu certe scias, kion li volas....

JAMES: Ne tiom certe, kiom vi supozas.

Prof-o THOMSON: Mi staras antaŭ vakuo, antaŭ nigra abismo, James. Nun, post kiam mi faris tion, ĉio ŝanceliĝis kaj mi perdis mian lastan certecon.... Kaj tia, sen fido, mi sentas min devigata decidi.

JAMES: Certe, se vi estus iu, kiu laboras en forgesita angulo, sed via pozicio....

Prof-o THOMSON: Aĥ, ne, knabo, ne mia pozicio kaj kio estas ligita kun ĝi. Tio signifas nur kontrakton, paperan sindevigon. Sed ĉi tie, interne, mi laboris por la popolo, al kiu mi apartenas; mi estas kore ligita kun la lando, kie mi naskiĝis kaj maturiĝis. Ĉu mi havas rajton deteni de mia popolo la fruktojn de la arbo, kiun ni kune kulturis, kiu kreskis en nia tero?

GEORGE: (eniras dekstre): Profesoro!

Prof-o THOMSON: Vi, George, jam nun?

GEORGE: Oni sendis min ĉi tien. Greenway venos tuj post mi. Via komisio falis en la kunvenon kvazaŭ bombo. Oni parolis pri sabotado, kaj Greenway menciis la fatalan influon de via filo.

Prof-o THOMSON: Ankoraŭ pli?

GEORGE: Oni nomis tion eĉ perfido al la patrio.

JAMES: Nu, nu!

GEORGE: La fabriko estas armea entrepreno kaj ĉiu, kiu laboras tie, ĉu profesoro, ĉu transportlaboristo, devas obei kiel soldato.

Prof-o THOMSON: Ili kuraĝas!

GEORGE: Ili diris eĉ pli multe, sed tion vi aŭdos de Greenway mem. Li tuj estos tie ĉi. Li nepre deziras hodiaŭ ricevi la raporton, indiferece, ĉu ĝi estas preta aŭ ne, kaj

la afero pri la stabileco ne interesas lin.

JAMES: Ĉu mi ne pravas?

Prof-o THOMSON: Tion ni povis atendi. Sed nun mi scias, en kia situacio mi troviĝas. Kaj vi ambaŭ?

GEORGE: Ni?

Prof-o THOMSON: Jes, Mary kaj vi.

GEORGE: Ĉu ni povus iel decidi en ĉi tiu afero? Vi estas la ĉefo.

Prof-o THOMSON: Sed via persona opinio?

GEORGE: James scias, kiel mi opinias. En haladza atmosfero oni povas pinĉe fermi sian nazon por ne flari la malbonodoron, sed ĉesigi la spiradon oni ne povas. Mi daŭrigos, se necese kun bulo da vatoj en la nazo. En afero kia ĉi tiu oni povas agi nur por si mem kaj laŭ propra respondec. Mi nur ĝojas, ke mi ne troviĝas en via haŭto, profesoro!

JAMES: Kaj vi, Mary?

MARY: En ĉi tiu afero mi ne povas juĝi. Mi scias nur, ke mi sentas ĝin alie. Mi apartenas al vi ĉiuj, al la malnova laborgrupo.

VOCO (post la kulisoj): Ĉi tie vi trovos la gesinjorojn.

GREENWAY (enirante dekstre): Pardonu, ke mi ĝenas, sed mi devas paroli kun vi, profesoro, tuj!

Prof-o THOMSON: Mi estas al via dispono.

GREENWAY: Ĉi tie?

Prof-o THOMSON: Kial ne? Ili estas miaj plej intimaj kunlaborantoj kaj scias, pri kio temas.

GREENWAY: En ordo. Cetere ne multe gravas. Vi devigis min veni ĉi tien kaj peti la raporton, kiun vi hodiaŭ devis transdoni.

Prof-o THOMSON: La raporton, kiu ne estas preta.

GREENWAY: Kiu devis esti preta! Vi disponis pri sufiĉe da tempo!

Prof-o THOMSON: Eksperimentoj starigas siajn propajn postulojn kaj ne kalkulas pri iu antaŭskribita daŭro. Ni

ankoraŭ ne estas pretaj.

GREENWAY: Tiam vi transdonu la raporton tia, kia ĝi estas, finita aŭ nefinita!

Prof-o THOMSON (*hezite malfermante sian tekono*): Ekscelenco, mi devas. . . . mi akcente atentigas vin. . . .

JAMES (*rektigas sin kaj lin rigardas*).

Prof-o THOMSON: Ne, ne, mi ne povas. . . .

GREENWAY: Estas via devo! Mi postulas!

Prof-o THOMSON: Vian postulon mi ne povas plenumi.

GREENWAY: Mi ordonas!

Prof-o THOMSON: (*silente rigardas James, kiu pli rektigas sin*).

GREENWAY: Profesoro Thomson, mi rememorigas al vi, ke vi ŝuldas obeon al la armea disciplino, kaj ke mi, se necese, povas devigi vin. . . .

JAMES (*malrapide, sed akcente*): Neniu potenco en la mondo povas devigi mian patron, ĉu ne vere, Patro? (*Li pli rektigas sin*).

MARY (*volante lin reteni*): James, atentu!

JAMES: Ne, lasu min! Mi ne povas plu toleri tion. Lasu min eliri!

Prof-o THOMSON: Sed, knabo mia!

JAMES: Ne. . . . Mi, ankaŭ mi volas diri ion. (*Li forlascas ŝtreĉante ĉiujn siajn fortojn, la malsanulan seĝon*): Vi, generalo Greenway, ni. . . . ni ankoraŭ ne estas pretaj. . . .

GREENWAY: Ĉi tio ne celas vin, sinjoro Thomson, kontraŭe. . . .

JAMES: Tio celas ankaŭ min; tio celas nin ĉiujn, tio celas la tutan mondon!

MARY: Restu trankvila, knabo, eksidu. . . .

JAMES (*ŝanceliĝante*): Ne, lasu min. . . . Mi povas stari. . . .
Mi. . . . mi volas fumi, ion fumi. . . .

GREENWAY: Cigaredon?

JAMES: Volonte.

GREENWAY: Jen, fumu; fumado trankviligas. (*Donante*

al li fajron): Ne ekscitiĝu. Vi ja staras ekster ĉi tiu afero?

JAMES: Neniu el ni staras ekster ĝi. Mi volas diri ion al vi, ĝuste al vi. . . . Vi veŝsajne ne komprenas, sed tamen. . . .

GREENWAY: Ne penu; mi konas vian vidpunkton. Sed vi eraras! La vivo ne konvenas en skemo de bono kaj malbono.

JAMES: Ĝi devas konveni, generalo, nur pri tio temas! Ni devas fari ĉi tiun skemon konvena, ni devas elekti inter bono kaj malbono.

GREENWAY: Ni? Kiu estas „ni”?

JAMES: Ni? Tio estas la junularo, la gejunuloj de hodiaŭ, kiuj alie fariĝus morgaŭ viktimoj. . . . pereintaj homoj, kiel mi. . . . Junaj homoj sopirantaj al vivo, sed kondamnitaj putri vivaj en sia floraĝo. . . . interne brulvunditaj ĝis la medolo de iliaj. . . . Sennombraj milionoj da homoj kiel mi. . . . Tio, generalo, estas la komenco, La batalo kontraŭ ĉi tiu pesto de la pestoj estas komencita, estas nun komencita kaj devas esti daŭrigata. Ĝi devas esti daŭrigata, daŭrigata, daŭrigata. . . . Mi krios tion ĝis mia lasta spiro. . . . Ĝi devas esti daŭrigata. . . . Ho. . . .

(Li falas elĉerpita en la seĝon).

Prof-o THOMSON: James, knabo mia. . . , doktoro Clark. . .

JAMES: Ne Patro, ne faru. . . .

MARY *(donante al li glason da akvo)*: Jen trinku.

JAMES: Dankon.

GREENWAY: Mi bedaŭras, ke mi sub ĉi tiuj cirkonstancoj. . . . Sed mi petis vin, ne resti tie ĉi, profesoro. Ni iru. . . .

JAMES: Ne, restu ĉi tie!

Prof-o THOMSON: Jes, mia knabo, mi restos, ĉe vi.

GREENWAY: La tempo urĝas, profesoro; la komisiono atendas.

Prof-o THOMSON: Mi ne povas!

GREENWAY: Soldato devas povi, ĉiam; li devas nur obei!

Prof-o THOMSON: Mi ne estas soldato; mi klopodas pensi.

Cetere, mi ne ŝuldas obeon al la armea disciplino. Nur al la plena komisiono mi ŝuldas respondecon.

GREENWAY: La rezultatoj de via laboro estas la propraĵo de la registaro!

Prof-o THOMSON: Jure tio eble estas ĝusta, generalo, sed morale ekzistas ĝis la nuna momento neniu, kiu rajtas postuli tion.

GREENWAY: Pri tio decidu. . . . -

Prof-o THOMSON: Nur mia konscienco. Daŭris longe ĝis kiam mi kuraĝis aŭskulti ĝin, sed nun mia hezitado forpasis kaj mia decido estas farita. Mi nun scias, ke la mondo ankoraŭ ne estas preta kaj la homaro ankoraŭ ne matura por posedi fortojn, por kies regado oni devus esti ne homo, sed estulo de pli granda perfekteco, iu Dio. Mi do atendas. . . .

GREENWAY: Oni ne lasas al vi tempon.

Prof-o THOMSON: Mi volas, kun helpo de Dio, provi tion.

GREENWAY: Sufiĉe, profesoro Thomson; ankaŭ mia tolero havas limojn. Mi vin atentigas, ke mi povas devigi vin al obeo, eventuale per rimedoj de la potenco. Estas al mi dolore, ke mi devas uzi ĉi tiujn vortojn kontraŭ iu kun viaj meritoj, kaj se mi lastfoje avertas vin, mi faras tion kiel iu, kiu dum multaj jaroj laboris kun vi kaj kiu plej alte estimas vian laboradon. Pli malproksimen mi ne povas iri. Do lastfoje. . . . Vi ankoraŭ povas elekti. . . .

Prof-o THOMSON: Ne plu, Ekscelenco, mi jam estas elektinta. Mia loko estas ĉi tie, ĉe mia filo. . . .

GREENWAY: Tiam vi akceptu la konsekvencojn. (*Li iras al la telefono kaj turnas numeron*): Ligu min kun la gardistejo. . . . Ĉi tie Greenway. . . . Jes, Greenway. Kun kapitano Collins? Kapitano, mi telefonas al vi de el la hospitalo. . . . Sendu ĉi tien tuj serĝenton kaj du soldatojn. . . . Ĝuste. Dankon. (*Li remetis la mikrofonon*). Eĉ nun ankoraŭ ne estas tro malfrue, Thomson. Vi ankoraŭ povas reveni de via decido.

Prof-o THOMSON: Ne, mi ne revenos.

JAMES: Ni devas iri *antaŭen*.

GREENWAY: Kian utilon povus havi via rifuzo? La raporto tamen venos tien, kie ĝi devas esti kaj cetero neniu estas urĝe bezonata, nek vi.

Prof-o THOMSON: Vi eraras. En ĉi tiu okazo estos malfacile, daŭrigi sen mia filo kaj mi kaj sen sufiĉaj instruoj. Per rimedoj de la potenco oni povas devigi la homon al multo, sed ne al ĉio.... Mi rifuzas.... (*Li disŝiras la raporton*).

GREENWAY: Sed tio.... tio estas frenezajo. (*Li kaptas la paperpecojn*).

Prof-o THOMSON: Tion la ŝtato povas preni, kiel ĝi prenis mian filon, sed (*montrante sian kapon*) ne ĉi tion.

GREENWAY: Profesoro Thomson, mi devas provizore aresti vin. De ĉi tiu momento vi estas al dispono de la militista tribunalo.

Prof-o THOMSON: De ĉi tiu momento mi estas *libera homo!*

JAMES: Patro!

(*En la malproksimo komencas mallaŭte muĝi fabrika fajfilego*).

Prof-o THOMSON: Mia filo! Kaj....

JAMES (*donante al li manon*): Dankon, Patro! Aŭskultu: la fajfilego, la fabriko vokas.... sed ne plu nin.... Por ni ĝi estas la signalo por nova komenco.... por vi kaj por ĉiuj, kiuj daŭrigos.... kiuj iros plue.... pli bone.... pli bone....

Dum la muĝado de la fajfilego malrapide fermiĝas la

KURTENO.

*En la programo por la teatra prezento oni se eble presigu
la jenan alvokon:*

ALVOKO.

POR KE viaj posteuloj vin danku anstataŭ malbeni vin;
por ke la tero senĉese donu abundon anstataŭ transformiĝi
en dezerton;

por ke la semo ne ĉesu doni fruktojn anstataŭ ŝrumpi en la
ĝermo;

por ke viaj floroj ne velku, kaj via bonodora ĝardeno ne
iĝu haladza rubejo;

por ke viaj libroj ne brulu kiel torĉoj, kaj viaj saĝuloj ne
vagadu inter la ruinoj kiel malraciaj estaĵoj;

por ke viaj urboj kaj vilaĝoj restu loĝeblaj anstataŭ ŝanĝiĝi
en ruinojn;

por ke la mola haŭto de via amatino ne malkomponiĝu en
puson kaj mukon;

por ke la sino de via ino amata estu fonto de vivo anstataŭ
marĉo de morto;

por ke la rido kaj la kanto de viaj infanoj ne transiru en
ploron kaj ĝemon;

por ke la tendenoj de viaj fortaj manoj ne rompiĝu kvazaŭ
velkintaj branĉoj;

por ke la pura lenso de via okulo, kiu vidas la mirindaĵojn
de ĉi tiu mondo, ne malklariĝu;

por ke via sango ne veneniĝu, kaj via sino konservu sian fekundecon;

por ke via buŝo laŭdu la vivon anstataŭ malbeni la horon, en kiu via patrino naskis vin;

por ke la suno ne ĉesu doni al vi la bonon de sia lumo, kaj ĝia brilo ne malaperu;

por ke la nokto donu al vi ripozon, kaj via dormo ne estu turmento;

por ke la kreanto triumfu super la detruanto kaj la ordo super la ĥaoso:

ESTU via ĉefa tasko kunlabore zorgi, ke la forto dormanta en la atomo, ne estu uzata por celoj detruaj; ke ĝi servu ne al la morto, sed al la vivo; ne al la milito, sed al la sola celo, kiu donas al la ekzistado sur ĉi tiu planedo sencon kaj enhavon:

LA PACO.

NEOLOGISMOJ NE TROVEBLAJ EN PLENA VORTARO:

<i>aprezi,</i>	taksi laŭ valoro.
<i>bunkero</i>	betona fortikaĵo.
<i>eŭforio,</i>	sento de plaĉo, de agrableco.
<i>iono,</i>	plej malgranda ero de materio.
<i>piradiumo,</i>	nomo, elpensita de la aŭtoro, por neekzistanta, sed eble iam eltrovota materio por la farado de atombomboj multe pli fortaj ol la ĝis nun fabrikataj.
<i>transmutacio,</i>	ŝanĝo de unu elemento en alian per speciala procedo.

VORTOJ EL ALIAJ LINGVOJ:

<i>displaced person,</i>	persono pro milito rifuĝinta el sia lando kaj pro tio senhejmiĝinta.
<i>number one,</i>	plej grava.
<i>si vis pacem, para bellum,</i>	se vi deziras pacon, preparu vin al milito.
<i>auctor intellectualis,</i>	spirita patro.

